


SIMPLE LA PLEJ BONAJ!

SALUTON! ESPERANTO AŬTOĎIDAKTE



Audrey Childs-Mee
(1926-1990).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Sepa eldono.
234p. 21cm.
ISBN 92 9017 050 6.
Prezo: € 10,80.
Triona rabato
ekde 3 ekzempleroj.

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO



Boris Kolker
(1939).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Dua, reviziita kaj
korektita eldono.
279p. 21cm.
ISBN 92 9017 078 6.
Prezo: € 18,00.
Triona rabato
ekde 3 ekzempleroj.

Bonvenu Paco

La plej popularaj 28
hebrea kaj jidaj kantoj
sur altkvalita 72-minuta
KD. Kantas Tova
Ben-Cvi kaj Chantal.
Esperantigis: J. Murjan,
J. Kohen-Cedek, A. Wandel.
Kolora broŝuro kun ĉiuj
tekstoj. 18 ĉuroj, triona
rabato ekde 3 ekz.

Esperanto per 500 vortoj

Leg-metoda lernolibro.
Uzeblas kiel memstara lernilo
en fronta instruado aŭ post-
kursa lernado.
Boris Kolker: "Imprĉas
tre plaĉe. Malofte eble
legi ion, konante nur
ducenton da vortoj."

Vok. 1: 200 vortoj, 225 paĝoj, 8,10 eŭroj
Vol. 2: 100 vortoj, 205 paĝoj, 8,10 eŭroj
Vol. 3: 200 vortoj, 260 paĝoj, 10,20 eŭroj
Ĉiuj tri volumoj: nur 24 eŭroj


Mendoj: ELI, P.O.K. 22041,
IL-61220 Tel-Aviv, Israelo
UEA-konto: eli-a-q

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legadon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
ĉiu estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 2003 aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 2003

Aŭstralio	32 dolaroj	Francio	19 eŭroj	Nederlando	19 eŭroj
Aŭstrio	19 eŭroj	Germanio	19 eŭroj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	19 eŭroj	Hispanio	19 eŭroj	Pollando	9 eŭroj
Brazilio	9 eŭroj	Irlando	14 eŭroj	Portugallio	19 eŭroj
Britio	12 pundoj	Italio	19 eŭroj	Svedio	185 kronoj
Danio	140 kronoj	Japonio	2200 enoj	Svislando	28 frankoj
Finlando	19 eŭroj	Kanado	27 dolaroj	Usono	18 dolaroj

Granda rabato por grupaj abononj
ekde ses ekzempleroj. Informigu!

ISSN 0014-0635

Esperanto

revuo



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1158 (4) • Aprilo 2003

Eŭropa Ponto

Parlamentara agado de UEA

kaj Lingva

Esperanto en Afriko

Ponto

www.lernu.net

al EU

Gotenburgo II.

Pri la milito



Esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org, marcek@esperanto.sk

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofinco:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR
32); informiĝu ĉe via landa asocio
aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero
kostas EUR 3,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p.
90. Movada rabato 50%. Anoncoj
sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ☎ +31-10-436-
1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.

Vi trovos...



tiun ĉi numeron en viaj leterkesto en malfacilaj momentoj.
La homaro denove ne trovis komunan lingvon por solvi la
konfliktojn kaj anstataŭ dialogo eksonis – la kanonoj. Sur nia eterne militanta
planedo do denove furiozas milito kaj vualas niajn revojn pri frata interkompreniĝo
kaj paco. Bv. pardoni al via redaktoro ke li ne povis ne doni iom da loko al ĉi tiu
temo sur la oficialaj paĝoj de la politike neŭtrala organizo. Por almenaŭ iom forgesigi
vin pri la terura realo, vi trovos legaĵojn ankaŭ pri pli ĝojgaj temoj: iniciatoj de niaj
gejunuloj, aktivaĵoj de francaj esperantistoj sur parlamenta nivelo, E-pioniĝo sur la
aŭstra du-eŭra monero, historio de nia lingvo en Afriko, nia Delegita Reto,
Gotenburgo, novaj E-libroj kaj aranĝoj de esperantistoj tra la mondo...

Enhavo

- 74 Malferme: Pri la milito (Renato Corsetti).
- 76 Nia nova paĝaro: www.lernu.net (La Teamo).
- 78 La parlamenta agado de UFE – Espérando-France: Ĉu modelo por la aliaj?
(Marko Naoki Lins).
- 79 Bertha von Suttner: la nobelpremiita pacbatalanto (Walter Klag).
- 80 Esperanto en Afriko (Hans Bakker).
- 82 Delegita Reto en 2001 – 2002 (Andrej Grigorjevskij).
- 84 Gotenburgo – la venonta UK-urbo II. (Christer Lönnemark).
- 86 Recenzoj: Seán Ó Riain pri *Sprachenpolitik in Europa, Zur Struktur von Plansprachen*
kaj *Domaine de la recherche en linguistique appliquée*. Peter Browne pri *Sur la*
altaro de Sundio, Protestantaj magnolioj kaj *Mia fenestro alĉiela*.
- 88 Navige tra TTT-paĝoj (Stano Marček). Netskapo en Esperanto.
- 89 Laste aperis.
- 90 Loke-Fake-Persone.
- 91 Oficiala informilo. Laste aperis (daŭrigo). Anonctetoj. Ĝustigo.
- 92 Tra la mondo: Porpaca manifestacio en Rio (Aloisio Sartorato). Nemovalaĵoj,
lernejoj, pokaloj (Emil Hrvatin). Surstrate kaj rete. Eŭropa Ponto kaj Esperanto
(Ottó Haszpra).
- 93 E-somero en bela orienta Usono (Humphrey Tonkin).
- 94 Krucenigma konkurso (Stano Marček). Forpaso.

FRONTPAĜE: La 15-an de marto 2003, okaze de la nacia festo, estis instalita en la
centro de Budapeŝto solene lumigita flosponto, simbolanta la Ponton al Eŭropa Unio.
Hungaraj esperantistoj eluzis la solenaĵon por atentigi pri alia, lingva ponto al Eŭropa
Unio: Esperanto (legu pli sur la p. 92).
Foto: Olivér Haszpra

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, Unesko): d-ro Renato
Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio;
☎ +39-06-957-57-13; ☎ +39-06-957-66-33; ✉
renato@esperanto.org.

**Vicprezidanto (strategio kaj planado, esploro kaj
dokumentado, UN Novjorko):** prof. Humphrey
Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107
Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ☎ +1-860-561-52-
19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ☎ +1-860-768-44-
11 [of]; ✉ tonkin@mail.hartford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-
Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong,
Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h];
+82-53-652-4488 [of]; ☎ +82-53-652-8141 [of]; +82-
53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun
TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj,
Nobel-kampanjoj):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25,
HR-21000 Split, Kroatio; ☎ +385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; ☎ +385-(0)21-393-597 [of];
✉ osibov@pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen,
Kastelsstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlan-
do; ☎ / ☎ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@
esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika
agado:** s-ro Gbego Kalfi, B.P. 13169, Nyekonakpoe,
Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@
cafe.tg.

Informado: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-
14, RU-429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio;
☎ +7/83536/59856; ✉ volg@uea.org.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare
223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98;
☎ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.
org.

Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.

Observanto de ILEI: s-ro Maŭro la Torre.

Malferme

Pri la milito

Renato Corsetti

Ne estas facile skribi pri ĉi tiu temo en ĉi tiu revuo.
Aliflanke la redaktanto tute prave rimarkis, ke ni ne
povas ŝajni ke la milito ne okazas kaj pluparoli pri
niaj ĉiutagaj temetoj. Estas ankaŭ vere, ke UEA estas neŭtrala
pri politikaj demandoj, kaj certe milito estas nur daŭrigo de
politiko per aliaj rimedoj, kiel diris famulo en la pasinteco.
Ĉu tamen mi, kiel individuo, ne povas diri ion al multaj
individuaj esperantistoj, kiuj en ĉi tiu momento estas trafataj
de angoro kaj atendas eble vorton pri la afero, por reaktiri
iom da espero pri la estonteco? Estas tre malfacile diri ion
ekvilibranta.

Mi serĉis, laŭ mia ĉiama praktiko,
pecon el parolado de Zamenhof, aŭ
el liaj verkoj, pri la sama temo. Kun
granda bedaŭro mi devis rezigni,
ĉar Zamenhof estis tre malneŭtrala
pri milito kaj pri la instigantoj al
milito kaj malamo inter la gentoj. Se
li vivus nun, li apenaŭ povus esti
prezidanto de UEA. Fakte la plej
profunda motivo por lia agado estis
justa paco inter la popoloj, kaj por
tio li ankaŭ provizis lingvon (sed ne
inverse). La saman celon de
Zamenhof havis generacioj post
generacioj de esperantistoj, kiuj per
sia "misiisma" sinteno sukcesis
vivteni la lingvon, grandigi la komunumon, produkti kulturon,
en kiu la ideoj pri paco kaj egaleco tenas centran rolon.

Tio signifas, ke, malgraŭ tio ke UEA ne rajtas doni juĝon
pri la nuna milito, ni certe rajtas doni juĝon pri ĉiuj militoj.
Ni rifuzas ilin, aŭ almenaŭ mi kaj multaj aliaj esperantistoj
rifuzas ilin. Neniu estas devigata samopinii kun ni, sed ni
estas fieraj samopinii kun granda parto de la Esperanto-
kulturo kaj de la Esperanto-tradicio.

Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn la milito ĵus komenciĝis kaj
la novaĵoj pri morto kaj detruoj nur komencis time aperi
en la televidaj informoj. Mi esperas ke mortintoj kaj vunditoj
estos malpli multaj ol oni atendas, kaj ke kiam vi legos ĉi
tiun artikolon tiam almenaŭ la unua pli batala fazo de la

milito estos jam finiĝinta sen grandaj suferoj de la
koncernatoj.

Post la milito, kiam la kanonoj ĉesos bleki, ni devos ree
okupiĝi pri multo. Laŭ niaj ridinde malgrandaj kapabloj ni
certe faros nian eblon por kontribui al la materia
rekonstruado de Irako. La *Agado Espero* de UEA, kaj ĝia
branĉo *Lingvo de Paco*, fakte okupiĝas pri tiaj situacioj.
Krome ni devos kune kun multaj aliaj pli potencaj ol ni
okupiĝi pri alia grava vundito, pri Unuiĝintaj Nacioj kaj ties
rolo. Ni ne povas en ĉi tiu decida momento perfidi niajn tiel
ofte disanoncatajn *Konsultajn Rilatojn*, ni ne povas rezigni

pri nia ĉefa ideo: la malsamaj
popoloj devas interkompreniĝi en
paco kaj egaleco. En la nuna epoko
la nura tutmonda loko, kie la
popoloj (ankoraŭ nur pere de siaj
registaroj) renkontiĝas kaj diskutas
estas Unuiĝintaj Nacioj. Helpi ilin
estas helpi nin, ĉar finfine ni sur la
lingva-kultura kampo, kiel ili pli
ĝenerale, volas nur starigi mondan
ordon en kiu interkompreniĝo
laŭgrade prenos la lokon de
perforto, kaj prenos la lokon de
gvidantaj landoj kaj gvidataj
landoj.

Inter ĉiuj aferoj, kiujn mi legis
lastatempe, unu aparte trafis min. Ĵurnalisto konstatas, ke
kiam la tiamaj potencaj landoj komencis malatenti la tiaman
Ligon de Nacioj, oni tre rapide ekmarŝis en la direkto de la
dua mond-milito. Ni ne volas, ke tio reokazu nun. Tial mi
diras al la legantoj: *Ne timu, la milito baldaŭ finiĝos, sed ĝi
ne solvos ion. Nia laboro por paco, justeco kaj interkompreniĝo
estos eĉ pli bezonata.*

Ni fermu ĉi tiun mallongan artikolon per la vortoj de alia
"ekstremulo", Kálmán Kalocsay, kiu invitas nin per sia
Kongresma Rulo:

*Luktu firme, fajre, forte / kaj sufoke kaptu kole
tiun urson ulno-ungan / monstiron de la Mortolando
la militon malicegan.*



Atako kontraŭ Bagdado



foto: Cathian MacAodh

Protesto de esperantistoj en Dublino





Nia nova paĝaro: www.lernu.net



lernu! estas nova plurlingva reta *kursejo* por Esperanto. Lanĉita fine de decembro 2002 ĝi jam ekzistas en 16 naciaj lingvoj kaj havas ĉirkaŭ mil registritajn uzantojn.

Priskribo de la paĝaro

La paĝaro www.lernu.net enhavas ĉirkaŭ 350 paĝojn kun tre diversa enhavo, por homoj kun malsamaj antaŭscioj kaj gustoj. Por faciligi la navigadon, ili estas grupigitaj en la jenajn partojn: *lernu!*, *enkonduko*, *kursoj*, *helpiloj*, *biblioteko*.

Enkonduko

En tiu ĉi parto oni povas informiĝi kaj konatiĝi pri/kun Esperanto kiel fenomeno kaj kiel lingvo.

Pri Esperanto: La teamo de *lernu!* prezentas siajn pensojn pri Esperanto.

Lingvoprezento: Jen, oni povas gustumi la lingvon mem.

Utilaj frazoj: Listo de kelkaj utilaj frazoj, ankaŭ estas ebla ekzerci pri ili.

Kursoj

Momente estas tri kursoj en la paĝaro; ni esperas povi aldoni pli dum la printempo (se vi havas ideon pri kurso bv. kontakti nin!).

Ana Pana: Nivelo: komencanta.

Komento: Koresponda kurso kiu ebligas fari la unuajn paŝojn en la lingvon kun helpo de spertaj Esperanto-parolantoj.

Jen nia IJK: Nivelo: komencinta.

Komento: Oni kaj lernas pli da Esperanto kaj ricevas imagon kia estas granda renkontiĝo de Esperanto-junuloj.

Gerda Malaperis! Nivelo: daŭriga.

Komento: Vaste uzata lernilo de la lerta Esperanto-verkisto Claude Piron. Samtempe estas interesa krimromaneto.

Sur la bildo: la vortaro sur la paĝaro www.lernu.net estas supre dekstre kaj la tujmesaĝilo estas malsupre dekstre.



Helpiloj

Lerni novan lingvon estas longdaŭra proceso. Jen tri iloj al kiuj oni ofte povas reveni por ricevi helpojn kaj subtenojn.

Gramatiko: Donas superrigardon de la Esperanto-gramatiko.

Vortlernado: Helpas internigi novajn vortojn.

Lingvodemandoj: Prezentas diversajn lingvodemandojn kaj respondojn al ili.

Biblioteko

En la biblioteko troveblas libroj, muziko kaj filmoj.

Rakontoj kaj libroj: Rakontoj en diversaj niveloj. Vi povas kaj aŭskulti kaj legi ilin.



La aŭtoroj de la projekto kaj de tiu ĉi artikolo (La Teamo): Sonja Petrović, Henning von Rosen, Arono Chapman kaj Håkan Lundberg (mankas Clayton Smith), dum planrenkontiĝo en Davis, Usono.

Muziko: Kelkaj kantoj en Esperanto. Eblas legi la tekstojn.

Filmoj: Troveblaj estas ankaŭ filmetoj. Iom frenezaj sed espereble tamen spektindaj!

Krome...

Enestas ankaŭ vortaroj, help-paĝoj kaj tujmesaĝilo. Utila afero estas ke oni povas klaki sur vorton en ajna Esperanta teksto kaj tuj venas la traduko en la vortar-fenestreto. Kadre de la paĝaro estas organizita iuspeca uzant-komunumo, kun la nomo *mia lernu!*. Per ĝi oni povas interŝanĝi mesaĝojn, prezenti sin kaj rigardi prezentojn de aliaj uzantoj, sekvi sian evoluon tra la paĝaro, havi personajn listojn kun lernitaj kaj malfacilaj vortoj ktp.

Via helpo estas bezonata!

lernu! estas novnaskito kaj bezonas multe da subteno por kreski... Ni tre ĝojus se vi povus kunhelpi. Specialan atenton ni volas doni al *tradukado*, *informado* kaj *lingvohelpado* al uzantoj:

Tradukado

Por ke nova uzanto de la paĝaro kaj interesito pri Esperanto sentu sin sekura ekde la komenco, gravas ke ŝi aŭ li povu uzi sian gepatran lingvon por informiĝi pri Esperanto kaj *lernu!*. La paĝaro ekzistas jam en 12 naciaj lingvoj. Se vi volas helpi kiel tradukanto aŭ kiel kontrolleganto, bv. skribi al traduki@lernu.net.

Informado

Estas malfacile atingi multajn homojn sen multekostaj informkampanoj. Ni provas atingi maksimumajn rezultojn per la rimedoj kiujn ni havas, kaj por tio bezonas vian helpojn! Ĉe www.lernu.net/informadi troveblas printebla *lernu!-faldfolio* en multaj lingvoj. Tie eblas mendi ankaŭ *lernu!-afiŝojn*, por pendigi ĝin en viaj lernejo/universitato/laborejo/urbo. Vi povus mallonge informi pri *lernu!* en via nacia aŭ loka E-revuo.

Lingvohelpanto ĉe lernu!

Unu el la celoj de la paĝaro estas ke komencanto de Esperanto ricevu subtenon de homoj kiuj jam bone regas la lingvon kaj volas helpi al aliaj lerni ĝin. Tiuj homoj, nomataj *lingvohelpantoj*, estas tre gravaj por *lernu!*. Iliaj taskoj estas legi kaj respondi en la koresponda kurso *Ana Pana*, respondi demandojn kaj paroligi komencantojn. Se vi volas fariĝi lingvohelpanto ĉe *lernu!* kaj tiel helpi al novaj esperantistoj, skribu al lingvohelpanto@lernu.net por pliaj instrukcioj.

Subtenantoj

lernu! estas realigata fare de la internacia laborgrupo *Esperanto@Interreto (E@I)*. La tri ĉefaj agadkampoj de E@I estas: krei ret-paĝarojn, aranĝi seminariojn kaj informi pri tio, kiel Esperanto kaj Interreto kune uzeblas por tutmonde komuniki facile kaj rapide! *lernu!* estas finance subtenata de la usona esplorfondado Esperantic Studies Foundation (ESF). ESF fondiĝis en 1968 unuavice por subteni kaj stimuli la evoluigon de la anglalingva faka literaturo pri Esperanto. Iom post iom la uzado de Esperanto en edukado fariĝis unu el la prioritataj zorgoj de ESF.

La Teamo



<- Desegnaĵoj de Helen Claesson ->

esperanto France Ĉu modelo por la aliaj?



Jam de jaroj esperantistoj tre fervore kultivas la parlamentan agadon dum kiu ili aŭ rekte informas pri Esperanto aŭ atentigas pri ĝeneralaj temoj ligitaj al Esperantio (ekzemple lingvopolitiko aŭ lingva diskriminacio). Modele la agadon praktikas la francaj esperantistoj. La landa asocio *Unuiĝo Franca por Esperanto – Espéranto-France*, kun la helpo de la regionaj federacioj de Francio, kontaktis dum la lastaj monatoj la francajn deputitojn, kaj de la Eŭropa Parlamento, kaj de la Nacia Asembleo.

Eŭropa dimensio de nacia agado

Claude Longue-Épée, prezidanto de UFE kaj ĉefa motoro de la agado, klarigas ke ilia strategio havis tri direktojn: Ni decidis ke nia unua kampo estu eŭropa. Do, ni ekkontaktis francajn deputitojn en la Eŭropa Parlamento kaj nur la demokrateco.

Kampanjo de regula informado per leteroj kaj rektaj rendevuoj kreis etoson de malfermiteco kaj informiteco ĉe ambaŭ flankoj. Longue-Épée substrekas la tuŝitajn temojn: Ni klare diris ke ni opinias ke Esperanto estas ŝirmilo de la lingva kaj kultura diverseco kaj ke Esperanto povas esti neŭtrala, objektiva, preciza, nuancplena kaj monŝpara interpreto pontlingvo, por debatoj de parlamento kaj de laborgrupoj, kaj por diskonigo al ŝtatoj kaj al civitanoj. La internacia lingvo tiel estus objektiva garantio de aŭtentika eŭropa multlingveco, kontraŭ riskoj de lingva hegemonio kaj lingva diskriminacio. – Aldone al la leteroj, diras la prezidanto de UFE, estis almetitaj diversaj dokumentoj, ekzemple la Manifesto de Prago aŭ Ĝisdate pri Esperanto.

Sed la granda kaj pena laboro havis tre sukcesan rezulton, ĉar 20 eŭropaj deputitoj (el 78 'demokratuloj') sin deklaris favoraj al promocio de Esperanto en Eŭropo. Inter ili 5 deputitoj efektive montrigis helpemaj kaj aĝemaj (Nobel-premio, oficialaj deklaroj, interveno favore al *Euŝkola*, subskribo de peticio kontraŭ diskriminacio). Kvin aliaj eŭropaj deputitoj restas skeptikaj, bedaŭras Xavier Dewidehem, aktivulo de la junulara Esperanto-asocio JEFO kaj unu el la ĉefkunordigantoj de la 'Eŭroskola'-projekto, sed ili daŭre korespondas kun ni, kaj ne kontraŭstaras.

Informkampanjo al naciaj deputitoj

Post la printempa balotado 2002 UFE turnis sian atenton al la naciaj deputitoj. Vincent Charlot, komisionano por eksteraj rilatoj, klarigas: La naciaj deputitoj jam havis bildon pri Esperanto, ĉar UFE jam antaŭe faris informkampanjon. Akompane ni ankaŭ rilatis kun la ministerio pri klerigado. Li substrekas ke la kampanjo

mem estis mastrumita de la regionaj federacioj de UFE, kiuj kontaktis per leteroj siajn lokajn deputitojn. La temoj estis tre abundaj, opinias entuziasme Charlot, ni menciis ke Esperanto estas propedeŭtiko por ŝatigi kaj faciligi lernadon de fremdaj lingvoj, ke la internacia lingvo estas garantio de aŭtentika – ne devojigita – plurlingveco, ke Esperanto povas esti laŭvola ekzamenero en bakalaŭro kaj proponis fine ankaŭ instruadon de Esperanto eksperimente, fake kontrolota, en unu aŭ du gimnazioj. – Ni nur trafis proksimume 150 deputitojn, rimarkigas Longue-Épée, el ili proksimume 15 skribis oficiale al la ministro aŭ starigis oficialan demandon debatitan en la parlamento, por proponi Esperanton en bakalaŭreco. Kaj la ministro? La ministro ĉiufoje respondis – same negative – sed precizigante, ke Esperanto povas esti instruata, en ĉiuj gimnazioj, laŭ eksterhoraj ne oficialaj kursoj, emfazas Longue-Épée.

Parlamentara agado kontraŭ lingva diskriminacio

Tria granda parlamenta agadkampo de UFE estis kampanjo al naciaj deputitoj, kiuj jam starigis oficialan demandon por defendo de la franca lingvo.

Dum la lastaj monatoj de 2002 UFE koncentris sian parlamentan agadon al la temo de lingva diskriminacio per sendado de leteroj al 21 deputitoj. Longue-Épée klarigas: En kunlaboro kun la Brusela Komunikadcentro ni sugestis al la deputitoj demandi: "Kion faras la ministro pri la eŭropaj aferoj, koncerne la lingvan diskriminacion favorantan la 'denaskajn angloparolantojn' en dunganoncoj de Eŭropuniaj instancoj kaj en organizaĵoj subvenciataj de Eŭropa Unio?" Ĝis nun 10 deputitoj starigis po unu oficialan demandon, laŭ la modelo proponita – kaj informis min pri sia klopodo – kaj ricevis saman oficialan nekontentigan respondon. – Eble tio unuarigarde ne ŝajnas tre kuraĝiga, sed ni estas nun en bona kontakto kun pluraj parlamentanoj kaj la nekontentigaj respondoj ebligas ke ni daŭrigas nian parlamentan agadon provokante kaj sugestante novajn demandojn, opinias la prezidanto de UFE.

Marko Naoki Lins

Bertha von Suttner la nobelpremiita pacbatalanto

La 2-eŭra monero el Aŭstrio memorigas nin pri unu el la plej fervoraj batalantinoj por paco: Bertha von Suttner. Jen la historio laŭ Walter Klag el *La dua jarcento de Esperanto* 2/1997.



En la tempo, kiam la kredo, ke la patro de ĉiuj aferoj estas la milito ĝeneralis en la alta socio, ŝi iris alian vojon kaj fondis la unuan pacisman movadon. Ke ŝi pledis ankaŭ favore al Esperanto, pravas la vortoj de Heinrich Arnold: Estis la jaro 1906, kiam baronino Bertha von Suttner, gastante ĉe miaj gepatroj, la unuan fojon atentigis min pri Esperanto kaj al mi, juna homo, rekomendis la lernadon de tiu ĉi lingvo. Mi sekvis la inviton, kaj kiam da gojo mi ŝuldas al Esperanto! Senfinan spiritan kaj animan gajnon, multajn ne forgesblajn tagojn, la plej karajn memorojn.

Bertha von Suttner naskiĝis kiel filino de la grafo Franz Joseph Kinsky de Chinic kaj Tettau en Prago la 9-an de junio 1843. Kiam ŝi naskiĝis, la patro ne plu vivis. Kelkajn jarojn poste la patrino translokiĝis kun la eta Bertha al Brno kaj poste al Vieno. Ŝi ricevis por si kaj la filino alimenton de la familio Kinsky.

La junaĝo pasigis la juna Bertha en Vieno, en la banloko Baden apud Vieno kaj en diversaj aliaj kurac- kaj banlokoj. Tri gefianĉiĝoj finiĝis sen geedziĝo. En la jaro 1873 ŝi iĝis edukistino ĉe la familio de la barono Suttner. Tiu familio posedis domegon en Vieno kaj kastelon en Harmannsdorf, 80 km nordokcidente de Vieno. La familio vivis vintre en Vieno kaj somere en Harmannsdorf. La barono havis kvar filinojn kaj unu filon. Tiutempe Bertha estis 30-jara, la juna barono Suttner 23-jara. Bertha estis bona edukistino kaj bona kamaradino, ankaŭ por la filo Artur. Iom post iom la kamaradeco iĝis granda amo. Sed la familio Suttner ne deziris interligon. Tial baronino Suttner proponis al Bertha aspiradon kiel sekretariino ĉe la industriisto Alfred Nobel, kiu tiam loĝis en Parizo. Bertha konatiĝis kun Nobel, sed du semajnojn poste ŝi vojaĝis al Vieno kaj sekrete edziniĝis kun Artur von Suttner. Post la nupto ili ferojis al Kaŭkazio, kie Bertha havis malnovan amikino, la rusan prinĉinon de Mingreljo. Naŭ jarojn ili loĝis tie, en la urboj Kutaŝ, Tiflis kaj Zugdidi. Tie ili ankaŭ komencis labori kiel verkistoj. Ili verkis priskribojn de vojaĝoj por eŭropaj magazinoj kaj literaturaj revuoj.

En la jaro 1885 okazis repaciĝo kun la gepatroj de Artur kaj la paro revenis al Harmannsdorf kaj vivis tie. Vintre 1886-87 la paro restadis en Parizo kaj renkontiĝis tie kun Alfred Nobel. Tiu enkondukis la paron en la salono de sinjorino Juliette Adam, kiu estis granda patriotino. Jam ĉe la unua

vizito estis politikaj interparoloj. Bertha konatiĝis kun multaj interesaj kaj influhavaj personoj, ŝi ankaŭ informiĝis pri la ekzistado de la Internacia Societo por Paco kaj Arbitracia Tribunalulo en Londono. Bertha tre impresiĝis. Ŝi decidis labori por la paco. Dum la postaj jaroj 1887-89 ŝi verkis la romanon *Die Waffen nieder!* (For la batalilojn!). La romano aperis en 1889 kaj iĝis plena sukceso. Ĝi priskribis la sorton de virino dum la militoj en 1859, 1864-66 kaj 1870-71 kaj estas pledo kontraŭ la absurdo de milito.

En 1891 Bertha fondis la Aŭstran Pacsocieton kaj iĝis ĝia dumviva prezidantino. Ŝi partoprenis en ĉiuj packongresoj kaj – konferencoj. Perioda gazeto eldoniĝis sub la nomo *Die Waffen nieder* kaj poste *Die Friedenswarte* (La Pacobservejo).

Dum la kvara mondpaca kongreso en Berno en 1892 proponiĝis la fondado de eŭropa ŝtatunuigo. Ĝi malakceptiĝis. Alfred Nobel diris: *Miaj fabrikoj, kiuj produktas dinamiton, eble finos la militon pli frue ol viaj kongresoj. En la tuta, kiam du armeoj neniigos unu la alian dum unu sekundo, la homaro timos kaj*

forigos la trupojn. Bedaŭrinde la profetaĵo de Nobel ne efektiviĝis!

La 10-an de decembro 1896 Alfred Nobel mortis en sia vilao en San Remo. Li postlasis sian kapitalon por bonfaraj celoj, parton por pacaktiveco de Bertha von Suttner – ŝi estis, kiel la tria homo en la mondo, honorigita per la Nobelpremio por paco en 1905.

Antaŭ 105 jaroj, en 1898, la caro Nikolaus la II-a adresis al ĉiuj registaroj pacmanifeston pri internaciaj konferencoj por atingi veran kaj daŭran pacon. Sendube sukceso de Bertha von Suttner! En majo kaj junio 1899 okazis en Hago la unua packonferenco. Unuafoje delegitoj de ŝtatoj interkonsiliĝis! Bertha estis la sola ino. Dudek ses ŝtatoj partoprenis: ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, Usono, Meksikio, Ĉinio, Japanio kaj Siam (nun Tajlando). Oni rezoluciis kontrakton pri pacema finarango de konfliktoj. Oni ankaŭ establis permanentan internacian arbitracian tribunalon. (La dua Haga Packonferenco okazis en 1907; ambaŭ konferencoj ebeniĝis la vojon por la Ligo de Nacioj.)

Antaŭ 89 jaroj, la 21-an de junio 1914 Bertha von Suttner mortis en Vieno, 71-jara. Ŝi ne ĝisvivis la eksplodon de la unua mondmilito. Laŭ esploro de la germana profesoro Dietrich Stoyan la monero kun la portreto de Bertha von Suttner estas la plej movebla eŭro-monero en la mondo.

Esperanto en Afriko



La nova danco

Tiuj kiuj sekvas la afrikan agadon, ekzemple abonante la retliston *agado-en-afriko@yahoo.com*, jam plurfoje renkontis la esprimon *Nova danco*. Ĝin eltrovis Gbeglo Koffi. Lian nomon nun preskaŭ ĉiu leganto konas. Ankaŭ lian vizaĝon, ĉar ĝi ilustris la ĉefartikolon en revuo *Esperanto* de februaro. En tiu numero aperis ankaŭ artikolo de Raoul Hounnake: *La deka Togolanda*, en kiu li skribis, ke la kongresa temo estis *Nova danco*. Ĝi esprimas ke la afrika agado devas ekde nun lerni novajn paŝojn. Finiĝis la epoko de *malnova danco*, kiu daŭris de 1980 ĝis 2002. Ĝi estis la epoko kiam eŭropanoj kune kun afrikanoj gvidadis la agadon de UEA en Afriko.

Pli *malnova danco* okazis en la jaroj 1960-1980, kaj ankoraŭ pli *frua pratempo* okazis de la aŭroro de la 20-a jarcento ĝis 1960, la jaro kiam Afriko komencis formale ekskoloniigi.

Pratempo

Revuo *Esperanto* de 1914 publikigis statistikon de UEA-membroj en resp. la jaroj 1913 kaj 1914: Algerio: 1/4; Egiptio: 8/29; Maroko: 2/6; Sudano: 0/1; Tunizio: 4/3; Okcidenta Afriko: 0/1; Suda Afriko: 10/44.

Evidente eŭropaj entuziasmoj importis la lingvon al tiuj landoj. Iliaj rezultoj multe variis. Jam tiam la fenomeno ekzistis, ke pro vigla agado de unuopuloj ekflugas fajro kiu poste – estingiĝas.

Ekzemple, en Madagaskaro jam en 1901 aktivis du esperantistoj, unu franca kaj unu malagasa. En 1907 fondiĝis malagasa Esperanto-grupo kaj ankaŭ

ĵus aperis Esperanto-traduko de nederland-lingva universitata diplomverko de Heidi Goes, belga afrikistino.

Ĝia titolo estas: *La Esperanto-movado en Afriko, kun speciala atento por Tanzanio kaj Togolando*. Heidi montras ke Esperanto en Afriko havas historion, kiu reiras ĝis preskaŭ la komenco de Esperanto. En tiu ĉi artikolo Hans Bakker kunplektas tiun prahistorion kun la periodo de post 1980, kiam UEA komencis doni multan atenton al tiu kontinento.

alia grupo en la 13-a regimento de la franca kolonia infanterio. Tiu lasta havis 30 membrojn. Dudek jarojn poste la statistiko nombras nur unu esperantiston kaj neniun klubon. Sparkoj fajrigis jen kaj jen la movadon, sed la amas-evoluo de Esperanto en Eŭropo ne kuntrenis Afrikon.

La postkoloniaj jaroj 1960 - 1980

Grandaj nomoj en la movado de tiuj jaroj estis Tibor kaj Antonij Sekelj. Precipe la aventuroj de Tibor Sekelj, esploristo kaj verkisto, estis sensaciaj.

Ankaŭ en Afriko

UEA eldonis en 1962 broŝuron de Tibor Sekelj *The international language Esperanto, Common language for Africa, Common language for the world* (*La internacia lingvo Esperanto, komuna lingvo por Afriko, komuna lingvo por la mondo*). Tiu broŝuro estas uzebla eĉ nun.

La 8-an de marto 1962 ok aventur-emuloj gvidataj de Tibor Sekelj ekvojaĝis al Turkio, Sirio, Egiptio kaj pli suden. Tiu *Karavano de amikeco* celis longan vojon tra tuta Afriko, sed ĝi atingis sian finon en Dar-es-Salam (Tanzanio) en 1963. La celo de la karavano ne estis disvasti Esperanton en Afriko. Sekelj vekis interesiĝon ĉe kleruloj ĉie kie li pasis, sed li ne organizis ilin. La *Karavano de amikeco* pasis sed ne lasis daŭran spuron.

En 1970 aperis alia nomo: Renato Corsetti. La juna Renato estis estrarano, eĉ prezidanto, de TEJO. En 1969 TEJO kongresis en Tyreso, Svedio, kie ĝi malfrue vekiĝis en la nova epoko de

junulara protesto. Precipe Humphrey Tonkin vekis ĝin per inspira prelego. Sekve de tio, TEJO lanĉis lavangon da agado kontraŭ kultura kaj lingva imperiismo. Tiu emancipada tasko koncernis ne nur Eŭropon sed ankaŭ Afrikon. Multaj el la tiutempaj entuziasmoj, nun grizharaj kaj sulkvizaĝaj, restis ĝis nun fidelaj al UEA. Inter ili la verkanto de tiu ĉi artikolo. Rezistado kontraŭ kultura kaj lingva koloniismo estis lia ĉefa motivo por komenci afrikan karieron en 1980.

Esperanto en Afriko 1980 - 1990

En 1980 Renato Corsetti jam ne plu estis TEJO-membro. Li eniris la estraron de UEA kaj okupiĝis i.a. pri regiona agado. En la Universala Kongreso de Stokholmo, 1980, li savive vekis en plenplena salonego grandan entuziasmon por agado en "regionoj": Latin-Ameriko, Afriko, Azio.

Kiel varbi lernantojn en Afriko? Simple! Lernantoj sin anoncis grandnombre. En Kenjo, Nino Vessella publikigis kelkajn anoncetojn en svahilaj gazetoj. Multaj komencis sekvi lian suahillingvan kurson. En okcidenta Afriko Germain Pirlot sisteme respondadis al tiuj afrikanoj kiuj serĉis korespond-amikojn per *Jeune Afrique* kaj *Bingo*.

Ne nur UEA estis aktivega. Ankaŭ SAT laboris siamaniere. Aperadis gazetoj, bultenoj, artikoloj. En 1987, la jaro kiam Esperanto fariĝis centjara, Hungara Esperanto-Asocio faris paŝon de historia graveco: ĝi invitis 13 afrikanojn al Budapeŝto por kvinsemajna Cseh-seminario. De tie la grupo vojaĝis al la TEJO-kongreso en Krakovo kaj al la

jubilea Universala Kongreso en Varsovio. Antaŭ miloj da aplaŭdantoj ili staris sur la podio – kiel apogeo de nova movado en Afriko.

Multaj, multaj esperantistoj emocie bonvenigadis tiujn afrikajn fratojn. En unu movo Afriko okupis sian lokon en Esperantujo.

Esperanto en Afriko 1990 - 2000

Abundis la kursfinintoj en Afriko. Normale, kursfininto membrigas en asocio, aliĝas al klubo, ekkorespondas, partoprenas kongresojn. En Afriko ne estas tiel. Neniu el la junaj finlernintoj havis la monon por tio. Sed – neniun problemo. La movado ne nur aplaŭdis sed ankaŭ donacis monon al Fondaĵo Afriko, komencis korespondadon, ĝemelis klubojn, invitis afrikajn amikojn transmaren. Asocioj donacis membrecojn. Eldonistoj eldonis siariske libretojn. Bultenoj kaj gazetoj en Afriko kiel fungoj ekkreskis – kaj multaj kiel fungoj mortis. Kelkaj tamen restis aperantaj: *Ondo da Vero*, *Inter Ni*, *La Afrika Reto*. Ĝis hodiaŭ.

Varbado de novuloj tute ne estis problemo. La problemo troviĝis aliloke: kiel akcepti ilin? Kie trovi instruistojn? Kie trovi ĝemelajn klubojn? La malnova, ĉefe eŭropa esperantistaro devis mobilizi sin por akcepti la ondon de novaj lernantoj, kiuj foje miskomprenis kian utilon esperi de sia aliĝo.

En 1989 aperis broŝuro pri la strategio por la agado en Afriko. En revuo *Esperanto* de januaro 1990 ĝi aperis kiel granda artikolo. Se mi devas resumi ĝin per unu slogano, jen ĝi: *En Afriko ni ne bezonas pli multajn sed pli bonajn esperantistojn*. El la triopo *Varbado, Instruado, Utiligado*, la lasta estas la plej grava kaj malfacila, la dua estas grava kaj malfacila, kaj la unua estas facila kaj senutila se mankas la dua kaj tria.

Okazis Afrikaj Kongresoj en Togolando, Benino, Ganao, Tanzanio, kun cento da afrikaj kaj deko da aliaj partoprenantoj. Pro deficitaj tiaj kongresoj ne plu okazas post 1995, sed naciaj kongresoj plu okazadis: en Kongolando, Madagaskaro, Benino, Togolando. Pri la deka togolanda kongreso raportis revuo *Esperanto* de februaro 2003. Tiujn kongresojn subvenciis UEA.

Nova danco ekde 2002

En la lastaj jaroj okazis denove ŝanĝoj. La unua estis ke afrikanoj transprenis la plenan gvidadon de sia movado. Por tio naskiĝis en UEA Afrika Komisiono kaj Afrika Oficejo. En la Afrika Oficejo deĵoras

Raoul Hounnake kaj Doumegnon Koffi, gvidate de Gbeglo Koffi. La dua ŝanĝo estas ke Afriko ne plu estas "io nova, io aparte bonveniginda". La ondo de entuziasmo pasis, ankaŭ en la donacemo por la afrika movado. Anstataŭ 20 000 eŭroj kiuj ĝis 1995 ĉiujare alvenadis al fondaĵo Afriko, nun alvenadas kelkaj miloj. Ne pli ol cento da fidelaj donacantoj kontribuas la plenan buĝeton.

La sekvoj estas ke fine de 2002 ĉesis la papera eldonado de *Ondo da Vero*, la tutkontinenta gazeto kun 400 ricevantoj. La 36-a numero aperis nur en la reto. Ŝrumpis la subvencioj al kluboj de \$40 jare al maksimume \$20. Kongresoj ne povos plu okazi kiel ĝis nun.

Afrika kapitalo

Por savi sian afrikan movadon, UEA kreis apartan konton *Afrika Kapitalo*. En ĝi kolektiĝis jam kelkaj dekmiloj da eŭroj, sed la celo estas kelkcentmiloj da eŭroj – tiom, kiom jam la azia movado sukcesis kolekti en sia *Azia Kapitalo*. La kapitalo estas netuŝebla. Nur la rento certigos la bazan funkciadon en Afriko, sendepende de la kapricoj de la konjunkturo. Ne nur donacoj, ankaŭ senrentaj pruntoj estas bonvenaj. Mecenato eĉ ne bezonas fizike verŝi sian monon al Roterdamo: ĝi povas resti en la konto de lia hejma banko, sed la rento fluos konstante al Afriko.

La homa kapitalo

Afrikaj esperantistoj ne sidas kaj atendas ĝis venos monhelpo. Ili entreprenas enspezigajn projektetojn, aŭ ili iel ajn pagas sian propran agadon. Ekzemplo de projekto: klubo en Zambio



Esperantistoj en Kigoma, Tanzanio, bezonas lernolibrojn por komencantoj kaj vortarojn. La progresantoj deziras korespondi tutmonde: Unuiĝo de Esperantistoj de Nyarugusu, U. E. N., c/o Bukuru Rubugara (prezidanto), P.O. Box 72, Kusu/Kigoma, Tanzanio.

komencis bredi kuniklojn kaj tiel sendependiĝas de subvencio. Alia ekzemplo: instruisto en Kiliba, Kongolando, veturas per biciklo trifoje semajne 34 kilometrojn por instrui Esperanton en elementa kaj duagrada lernejo en Uvira. Dum tiuj tagoj li ne havas enspezojn por manĝi. Krome, la biciklo foje paneas. Tion li faradas jam dum du jaroj. – Kiu eŭropa esperantisto agas same?

Iuj afrikanoj skribis al mi: *Esperanto ŝanĝis mian vivon*. – Esperanto en Afriko havas fascinan historion. Ĝi enhavas miraklojn. Ĝi meritas nian ĉirkaŭbrakon.

Hans Bakker

Notoj:

1. La Esperanto-traduko de la nederland-lingva universitata diplomverko de Heidi Goes, belga afrikistino, estas trovebla en la repaĝo de la tradukinto, Johan Derks: <http://home.tiscali.nl/derks/>. Ĝia titolo estas: *La Esperanto-movado en Afriko, kun speciala atento por Tanzanio kaj Togolando*. La nuna artikolo ĉerpas plurajn informojn el ĝi.

2. Revuo *Orienta* intencas publikigi similan artikolon pri tiu ĉi temo. Vi povas ĝin mendi ĉe: Japana Esperanto-Instituto, jei@mre.biglobe.ne.jp (larlibro de UEA 2002, p.204).

3. Informojn pri la afrika agado donas la TTT-ejo <http://perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/> simila artikolon pri tiu ĉi temo. Vi povas ĝin mendi ĉe: Japana Esperanto-Instituto, <http://www.dromadaire.com/esperantogo/ao>.

4. En julio 2002 aperis informfolio *Skizoj pri Esperanto en Afriko* kaj en oktobro 2002 sekvis alia eldono: *Skizoj -2*. Kun plezuro mi sendos en koverto tiujn foliojn al mendantoj. Mia adreso: H. Bakker, Kastelenstraat 231, NL 1082 EG Amsterdam, Nederlando. Ret-adreso: hansbakker@raketnet.nl.

5. Kiu volas per la reto sekvi la evoluon, povas aliĝi al la retlisto, sendante malplenan mesaĝon al agado-en-afriko-subscribe@yahoo.com.

Delegita Reto en 2001-2002

Post la apero de la unuaj miloj da E-parolantoj Ludoviko Zamenhof kelkfoje arde alvokadis ilin unuigi kaj krei internacian E-organizon. Senrezulte... Versajne, ĉar funkciigo de organizo obeas tute aliajn principojn kaj postulas malsamajn talentojn ol lingvokonstruado... Nur en 1908 Hector Hodler fondis UEA – la unuan tutmondan E-organizon, vere indan je tiu titolo.

La *formulo de sukceso* de UEA estis la sistemo, kiun ni nun nomas *Delegita Reto*. Nur poste venis la administrado de Universalaj Kongresoj, aliĝis la landaj asocioj kun miloj da aligitaj membroj... Sed la Delegita Reto daŭre restis la kerno de la Asocio, ĝia fundamento, konsistante el la plej movademaj kaj fidelaj individuaj membroj.

Kiel fartas la 95-jaraĝa Delegita Reto?

Por respondi tiun demandon fine de decembro 2002 okazis enketado inter la delegitoj de UEA, servintaj en la periodo inter la publikigoj de Jarlibro 2001 kaj 2002 (mezo de somero 2001 kaj septembro 2002). Pro ekonomiaj konsideroj oni turnis sin nur al tiuj, kiuj posedas retadresojn. La demando estis, ĉu ili estis petitaj pri delegitaj servoj, se jes, kiom ofte.

La enketiloj estis senditaj al 871 retadresoj en 75 landoj. Malgraŭ jarŝanĝaj festoj pluraj delegitoj kaj eksdelegitoj trovis tempon reeĥi kaj ĝis la 21-a de januaro 2003 al la enketo respondis 455 personoj de 65 landoj.

244 (54%) respondintoj deklaris, ke ili ricevis petojn kaj plenumis servojn enkadre de la Delegita Reto. 32 (7%) delegitoj skribis, ke ili ricevis petojn, ofte eĉ plurajn petojn, sed ili ne certas, ĉu tiuj venis pere de la Delegita Reto, aŭ per aliaj kanaloj. Samtempe 179 (39%) delegitoj opiniis, ke ili neniam ricevis petojn pere de la Delegita Reto, kvankam foje ilin atingis E-lingvaj informpetoj laŭ aliaj vojoj.

La delegitoj, menciintaj ciferojn, ricevis kaj plenumis 418 informpetojn pri sia lando aŭ urbo, 653-foje peris informojn pri lokaj e-istoj kaj E-grupoj, 488-foje estis kontaktitaj fakcele, kio sume signifas 1559 servojn.

Krom tio, kutime ekster siaj delegitaj devoj, ili ricevis 256-foje petojn pri gastigado, 495-foje korespondpetojn, minimume 342-foje alispecajn petojn (de neordinaraj ĝis monpetoj).

Certe, tiujn nombrojn necesas konsideri minimumaj, ĉar multaj respondintoj hezitis indiki precizajn ciferojn kaj skribis "kelkfoje", "multfoje", "dekojn da fojoj" k.s. kaj tial tiuj informoj ne estis enkalkulitaj.

Eĉ se tio estas guto, do, ne malgranda!

Ĉiukaze, bonvolu juĝi mem pri la stato de nia ĉefa Reto per la aldonataj statistikaĵoj kaj citaĵoj el la respondaj leteroj.

Andrej Grigorjevskij,
estrarano de UEA pri informado

Citaĵoj el kelkaj delegitaj respondoj:

Alfred Tailpied, Francio:

Nur unufoje mi estis skribe kaj telefone kontaktita de itala samideano: temis pri aĉeto kaj sendo de franca vortaro. Tio okazis sen problemoj.

Albert Claesen, Belgio:

Ekde 1982 ĝis la fino de mia deligiteco en 2000 (la lasta jaro kiam mi pagis mian UEA-kotizon), mi ricevis nur unu demandon pri malnova katedralo en Tongeren. Mi do estas konvinkita ke la deligiteco ne valoras la penon. Iam mi estis tre fervora Esperantisto, sed bedaŭrinde mi perdis la kredon je la valoro de tiu bela, facila, sed (preskaŭ) ne uzata lingvo.

Aniruddha Banhatti, Hinda Unio (Barato):

Min kontaktis Sauro Orsini per la Jarlibro, ĉar li havis bildkarton, kiun li volis sendi hazarde, metante fingron en la jarlibro sur mia adreso, kaj nun ni multe korespondas rete. Niaj komunaj interesoj estas parolekonada programaro en Esperanto!

Laŭlanda procentaĵo pri servoj

Lando	JES	NE	%
Usono	28	31	47
Germanio	24	23	51
Francio	22	7	76
Brazilo	22	23	49
Japanio	19	21	48
Nederlando	10	4	71
Finnlando	10	5	67
Italio	8	7	53
Hispanio	7	2	78
Svedio	7	7	50
Belgio	7	9	44
Hungario	6	1	86
Ĉinio	5	1	83
Britio	5	2	71
Kanado	5	2	71
Korea Resp.	5	2	71
Pollando	5	2	71
Israelo	5	5	50
Aŭstrio	4	0	100
Ĉeĥio	4	0	100
Argentino	4	1	80
Slovakio	4	2	67
Rusio	4	3	57
Albanio	3	0	100
Irano	3	0	100
Islando	3	0	100
Aŭstralio	3	1	75
Estonio	3	1	75
Norvegio	3	1	75
Nov-Zelando	3	1	75
Svislando	3	1	75
Hinda Unio	2	0	100
Kostariko	2	0	100
Litovio	2	0	100
Meksiko	2	0	100
Venezuelo	2	0	100
Jugoslavio	2	1	67
Kroatio	2	2	50
Armenio	1	0	100
Azerbajĝano	1	0	100
Benino	1	0	100
Bjelorusio	1	0	100
Bulgario	1	0	100
Ĉilio	1	0	100
Egiptio	1	0	100
Honduro	1	0	100
Irlando	1	0	100
Kubo	1	0	100
Madagaskaro	1	0	100
Makedonio	1	0	100
Malto	1	0	100
Peruo	1	0	100
Portugalia	1	0	100
Rumanio	1	0	100
Sud-Afriko	1	0	100
Uzbekio	1	0	100
Vjetnamio	1	0	100
Ukrainio	1	1	50
Bosnio-Herceg.	0	1	0
Kolombio	0	1	0
Luksemburgio	0	1	0
Mongolio	0	1	0
Slovenio	0	1	0
Togolando	0	1	0
Danio	0	4	0

JES – La nombro de la respondintaj delegitoj, kies servoj estis petitaj. NE – Nombro de la respondintaj delegitoj, kies servoj NE estis petitaj. % – Procentaĵo de la unuaj el entute.

Augusto Casquero de la Cruz, Hispanio:

Kiom, por mi estas malfacile rememori, sed vi povas kalkuli ke minimume 10-foje en ĉiu punkto, krom tio ke mi estas membro de Pasporta Servo...

Axel von Blottnitz, Sud-Afriko:

Kvarfoje eksterlandaj vizitantoj sin anoncis kaj la koncernaj Sud-Afrikaj urbogrupej aranĝis renkontojn. Sur tiu tereno ni estas ĝoje efikaj kaj profitas per tiuj vizitoj.

Christian Darbellay, Germanio:

La Jarlibro estas iel mia privata telefono- kaj adreslibro. La plimulto de la homoj kun kiuj mi rilatas estas en ĝi. La aliajn mi tutsimple alnotas en la koncerna pago.

Donald J. Harlow, Usono:

La listo de delegitoj foje utilis por trovi retadreson de iu, al kiu mi volis skribi alikuntekste, kaj mi du-tri fojojn uzis ĝin por direkti personon al delegito en urbo, kiun tiu volis viziti. Mi rekomendus, ke oni oficiale aldonu al la listo de delegitaj devoj la taskon servi kiel kontaktpersono por novuloj, precipe en la regiono kie servas la delegito.

Christian Lavarenne, Francio:

Samideano (el balta lando) bicikle venis en nian regionon sed subite ekmalŝanĝis kaj estis veturigita en malsanulejon apud Saint-Girons. Se mi bone memoras mi trovis alvokon de flegistino en mia telefonresponzilo, kaj kompreneble akceptis viziti lin. Li jam pli bone fartis sed havis neniun komunan lingvon kun la prizorgantoj, flegistoj kaj kuracistoj (krom unufoje sed nekontentige pere de la germana), kio estis sufiĉe perturba; kaj bonŝance mi jam kelkajn tagojn antaŭe renkontis lin unufoje, do li kon(et)is min pro nia samideaneco. Ni povis longe babilu, mi poŝtis leterojn (ĉar li ne havis monon) kaj, sekvan fojon, helpis al ili plenumi la elirpermesan dokumenton kaj klarigi al li ke ili kondukas lin al la stacidomo kun pagita bileto ĝis lia lando kaj kiel li devos nur ŝanĝi la trajnon en Tuluzo antaŭ ol esti akceptata en Parizo de aliaj helpemuloj. Mi skribis por li franclingvan mesaĝeton sur papereto por ke li povu montri ĝin al kiu ajn en la stacidomo por helpo certe elekti la taŭgan trajnon.

Egawa Harukuni, Japanio:

Mi prizorgis kontaktojn kun la kampadejo en mia urbo Wakayama por la dana futbala teamo, partoprenanta la Mondan Pokalon en la jaro 2002, laŭ la peto de la dana ĉefdelegito de UEA, s-ro Bent Wiinberg. Pri la agado estis informitaj ĵurnaloj kaj televido, kaj tio faris bonan propagandon por Esperanto. Ni ambaŭ peris Esperante la ehojn de ambaŭ landoj al ĵurnalistoj.

Rodolfo Canet Marín, Hispanio:

Kvankam mi ne apartenas al SAT, kelkaj SAT-membroj petis mian helpon por reguligi dokumentojn por la SAT-Kongreso en Alicante. Ĉiam mi respondis akurate por solvi al ili la peton. Mian adreson ili konis per la jarlibro de UEA.

Fernando J. Galvão Marinho, Brazilo:

Dum ĉi tiu periodo, kiel UEA-Delegito mi ricevis nenian apartan helpon-peton. Tamen, tio ne signifas, ke mi restis kiel senmova

movadano. Mi subtenis regulan korespondadon kun 2 eksterlandanoj: partoprenis 4 interretajn debatlistojn; ĉeestis ĉirkaŭ 10 lokajn Esperantajn renkontiĝojn; prelegis kadre de du el tiuj renkontiĝoj kaj partoprenis la 87-an UK en Fortalezo.

Hamzeh Shafiee, Irano:

Mi opinias ke Delegita Reto bezonas renovigon kaj novajn agadterenojn. Sed mi ne multe pensis pri tio por doni ideojn.

Huzimaki Keniti, Japanio:

Mi havis gastojn ĉe mi, sed mi ne povas diveni, ĉu ili vizitis min pro mia deligiteco aŭ pro mia pasportaneco, aŭ pro iu alia eco. Pardonon por mia neklara respondo. Sed bv. daŭre aperigi mian informon en la venonta jarlibro de UEA, mi petas. La densa reto de delegitoj montras utilecon de mia organizaĵo. Ne tre gravas, ĉu la reto estas efektive uzata aŭ ne. :-)

Jefim Zajdman, Ukrainio:

Ne! Strange, ĉar mi estas la unusola delegito en la aŭtonoma respubliko Krimeo.

João Manoel Aguilera Jr, Brazilo:

Vi elspezas monon por eldoni librojn (Pasporta Servo kaj Jarlibro), kiuj ne estas uzataj. Mi en la lastaj jaroj ne petis aŭ ricevis petojn pri informoj pere de la Jarlibro.

Josef Schiffer, Germanio:

... tamen mi pensas, ke la reto de UEA-delegitoj estas treege valora.

Mihail Šelestov, Bjelorusio:

Oni petis trovi mapon de Belorusio en belorusa lingvo.

Aleksandr Griščenko, Ukrainio:

Al mi sin turnis la sekretario de Norvega Esperantista Ligo s-ro Douglas Draper, kiu petis helpon por norvega pac-asocio.

Reima Rannikko, Finnlando:

Ankoraŭ ete pri la okazo sinjoro S.(nomo konata ĉe la red.) Li skribis al mi (kaj al multaj aliaj) en aprilo 2002 kaj petis sendi inkujojn por lia komputila presilo. Laŭ li tiaj inkujoj ne estis haveblaj en Pollando kaj li bezonis ilin por publikigi tradukojn de finnaj verkistoj por polaj infanoj. Mi bonvole sendis al li unu inkujon

(valoran ĉ. 40 EUR) ĉar li promesis pagi ĉiujn kostojn. Poste mi nenion aŭdis pri sinjoro S. kaj en la finna E-gazeto *Esperantolehti* post kelkaj semajnoj ankaŭ oni konstatis ke sinjoro S. ne estas fidinda. La afero mem ne estas grava por mi, sed se sinjoro S. misuzis la adresaron de delegita reto, mi konsideras lian agadon kiel strikte malhonestan.

Tomas Jansson, Norvegio:

Plurfoje pri mia fako (onkologio).

Nguyễn Dinh Long, Vjetnamio:

El deligitoj en Hô Chi Minh-urbo nur mi havas retadreson indikitan en la Jarlibro. Pro tio, ĉiuj E-vojaĝantoj al Vjetnamio retletere skribis al mi por informi pri sia vojaĝo, por ke mi bonvenigu ilin ĉe la flughaveno de HCM-urbo, por ke mi antaŭmendu hotelon, ktp... Dum ilia restado en Hô Chi Minh-urbo, mi ĝoje helpis ilin laŭ mia libera tempo. Mi bonvenigis geesperantistojn, kiuj alvenis el Japanio, Koreio, Usono, Aŭstralio, ktp...

Gotenburgo la venonta UK-urbo II.

Okcidenta Svedio

La ekskursoj dum UK iros, krom tiuj en Gotenburgo mem, al la provincoj Vestrogotio (Västergötland; okcidente de Gotenburgo), Bohuslando (Bohuslän; norde de Gotenburgo), kaj Halland (sude de Gotenburgo). Jen mallonga prezento de tiuj provincoj, kun mencioj de kelkaj el la ekskursoceloj.

Vestrogotio

En la historio de Svedio elstaras du regionoj: Svealand (Svealand), kun centro en Uppsala, kaj Gotio (Götaland), kun tiama centro en Skara (nordoriente de Gotenburgo). (Oni ankoraŭ mencias tiujn du landpartojn en la veterprognozoj.) Svedio formiĝis en la 11-a –13-a jarcentoj per kuniĝo de



Enirejo al la ĉi-jara kongresejo kaj ekspoziciejo en Gotenburgo troviĝas meze de la urbo.

Svealand kun Gotio. Laŭ historia tradicio Svealand dekomence estis la ĉefa potenco kaj subigis Gotion; la anekso de Gotio estis sufiĉe rapida proceso. Dum la lastaj 20 jaroj tamen ekestis debato pri la formiĝo de Svedio. La t.n. gotia skolo de historiistoj asertas, ke okazis male: Vestrogotio estis la tiutempa dominanta, potence kaj kulture, kaj ke nur post la 13-a jarcento la potenco transiris al la orientaj provincoj. La unuiĝo estis longa proceso, rezulto de multaj malgrandaj militoj inter provincoj kaj reĝoj, kaj Svedio estis dum longa tempo loza federacio de provincoj antaŭ ol fariĝi unu regno. Laŭ la tradicia skolo Svedio ekestis dum la pagana epoko kaj poste kristaniĝis iom post iom. La gotia skolo, male, asertas ke kristanismo estis la grundo por povi administri grandan land-areon (i.a. pro la administrado de la katolika eklezio), kaj kontrastigas la kristanan Vestrogotian en la 12-a jarcento al la regiono ĉirkaŭ Uppsala, kie oni tiutempe ankoraŭ kredis je vikingaj dioj.

La defendantoj de la establita historiskribado troviĝas ĉe la universitatoj k. s., dum multaj el la anoj de la gotia skolo troviĝas ekster oficialaj sciencistaj rondoj.

Kiel ajn, Vestrogotio estas tre riĉe dotita per antikvaĵoj. Ŝtonaĝaj kamparanoj starigis ŝtonblokajn tombomonumentojn antaŭ 4000 jaroj. Dum la popolmigrada tempo (400–500 p. Kr.) Vestrogotio estis riĉa kamparana regiono. Vestrogotiaj runŝtonoj de la vikinga tempo rakontas pri vojaĝantoj al Anglio kaj Bizanco. La provinco estis kristanigita en la 11-a jarcento. La kirkoj troviĝas sufiĉe proksime unu al la alia, kio montras ke la provinco estis dense loĝata. La urbo Skara (unue menciita en islanda sagao de 1015) iĝis en 1150 loko por la unua katedralo de Svedio.

Iama minejo de Långban en gubernio Vermlando (Postkongreso P1).

Unu el la ekskursoj vizitos ĝin kaj la monaĥan preĝejon de Varnhem, konstruita en la 12-a jarcento.

Post la 17-a jarcento la historio de Vestrogotio estas paca. En la nuntempo Vestrogotio estas konata i. a. pro sia teksaĵa industrio, kun la urbo Borås kiel centro, kaj pro industriaj urboj kiel Trollhättan (i. a. sidejo de la aŭtofabrikanto Saab).

Eblas veturi perboate de Stokholmo al Gotenburgo per Göta Kanal, kanalo konstruita en la 19-a jarcento. Ĝi kunligas la du plej grandajn lagojn de Svedio, Vänern kaj Vättern.

Bohuslando

La regno Norvegio ekestis en la 10-a jarcento kaj jam dekomence Bohuslando estis parto de ĝi. Tiam la areo inter la Oslo-fjordo kaj la elfluejo de Göta Älv (kie nun situas Gotenburgo) nomiĝis Viken (la golfo). La provinco Bohuslando estis posta kreaĵo. Ĝin konkeris Svedio en 1658. Unu el la restaĵoj el malnovaj militaj tempoj estas la fortikaĵo de Marstrand, kiu estas ĉefe de la 17-a jarcento sed ekkonstruiĝis en la 14-a.

Bohuslando estas plej konata pro sia marbordo kaj insularo, kiujn vizitas turistoj dum la somero (sed apenaŭ dum la resto de la jaro). Tie plej oftas rokoj kaj ŝeroj, glatigitaj de la fortoj de la iama glacio antaŭ pli ol 10 000 jaroj. Troviĝas unu fjordo, Gullmarsfjorden. Simile al la norvegaj fjordoj ĝi tranĉas profunde en la marbordon. Troviĝas ankaŭ idiliaj sabloplaĝoj. La arkipelago de Gotenburgo estas tre vizitinda. Oni atingas ĝin per pramo, per la samaj biletoj kiel por tramoj kaj busoj.



Naturbelaĵoj de Bohuslando



Bohuslando estas konata pro sia pitoreska marbordo kun idiliaj sabloplaĝoj kaj insularo kun rokoj kaj ŝeroj.

En Svedio oni rajtas iri sur fremda tero kaj tranokti sur ĝi unu nokton sen demandi la terposedanton. (Tio validas por arbaroj kaj herbejoj, sed kompreneble ne por kultivataj kampoj, kaj des malpli por ĝardenoj.) En multaj landoj ja ne eblas atingi la naturon tiel facile. Unu el la kondiĉoj de la rajto estas, ke oni ne damaĝu la naturon, ekzemple oni ne rompu la branĉojn de arboj k. a. kreskaĵoj, ne faru fajron en la naturo (krom sub certaj kondiĉoj), k.s.

Rokĉizaĵoj de la bronza aĝo troviĝas dise en okcidenta Svedio, sed koncentriĝo troviĝas en norda Bohuslando, en Vitlycke proksime al la vilaĝo Tanum. Malgraŭ natura glatigado de 3 000 jaroj (kaj acida aerpoluo) ankoraŭ videblas la ĉizaĵoj. Ili portretas homojn, ŝipojn, bestojn kaj vivojn de tiu tempo. La homoj estas tre skeme faritaj, sed ili havas piedojn – tiel malgrandajn, ke foje aspektas kvazaŭ koboldo iris trans la rokon. Unesko proklamis la rokĉizaĵojn monda heredaĵo. Samloke estas rekonstruita bronzepoka bieneto.

Fiŝado estas grava parto de la bohuslanda ekonomio. Inter la aliaj industrioj troviĝas ekzemple petrolrafinejoj en la urbo Stenungsund.

Halland

La iam dana provinco Halland fariĝis parto de Svedio en 1658. Al norda Halland iras unu ekskurso: al Åskhult, kamparana vilaĝo konservita en la stilo de la 18-a jarcento.

Christer Lörmemark

(Informoj pri ĉiuj ekskursoj troviĝas en Dua Bulteno, kiun ricevas ĉiu aliĝinto al UK 2003.)



La insularo de Bohuslando



Statuo pri Karolo IX (reĝo de Svedio 1599–1611)



Somero en la arkipelago



La rivero Säreån en centra Gotenburgo



Margolfeto en Bohuslando



La rok-ĉizaĵoj de Vitlycke, Talum



Tri legindaj nacilingvaj libroj pri interlingvistiko

Sprachenpolitik in Europa. Beiträge einer Veranstaltung am 13. November 1999. Red. D. Blanke. Prelegoj de la 9-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko pri eŭropa lingvopolitiko. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2001. Kun kontribuoj de Barandovská, Frank, Fiedler, Bormann, ... – ĉiuj en la germana. A4, 161 p. (Blanke 2001 A). € 15,00.

Zur Struktur von Plansprachen. Beiträge der 10. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik 17.-19. November 2000 in Berlin. Red. D. Blanke. Prelegoj de la 10-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko pri strukturo de planlingvoj. Eldono: Berlin: GIL, 2001. Kontribuis: Frank, Fiedler, Bormann.../ ĉiuj germane/. A4, 159 p. (Blanke 2001 B). € 15,00.

Domaine de la recherche en linguistique appliquée. Red. Tazio Carlevaro. Deuxième Colloque d'Interlinguistique: CDELI – La Chaux-de-Fonds. Bellinzona: Hans Dubois, 1998. 235 p. Esperante, france. (Carlevaro 1998). € 16,80.

La Eŭropa Konsilio de Sevilla en junio pasintjare, la regula pint-renkontiĝo de la 15 ŝtatestroj de EU, decidis ke oni konsideru la uzon de lingvoj en pligrandigita EU, kaj prezentu preparan raporton plej malfrue al la Kopenhaga Eŭropa Konsilio en decembro 2002. Klaras ke la interlingvistiko povus, kaj devus, ludi gravan rolon en tia esplorado.

Ĉi tie temas pri tri interlingvistikaj libroj kiuj estas aparte interesaj. *Blanke 2001* estas grava kontribuo al la Eŭropa Jaro de la Lingvoj kaj eldoniĝis do en eble decida momento por la eŭropa lingva politiko. Ĝi enhavas artikolojn pri Lingvodiversco – malbeno aŭ beno (Mattusch); Pri la tipologia riĉeco de eŭropaj lingvoj (Lötsch); La rusa kiel internacia perila lingvo (Kostmarov); Lingva politiko el franca vidpunkto (Klare); Ĉu ekzistas Eŭropo? Kio estas eŭropa? (Barandovská-Frank); Pri la traduko de la Goethea "Faust" al Esperanto (Fiedler); Spertoj dum la terminologia prilaborado de forsta faklingvo (Simon/Ullrich); kun valora bibliografio pri Lingva politiko en Eŭropo (Blanke/Schamhorst).

Gravas ke publikaĵoj kiuj celas influi la lingvan politikon de Eŭropo estu je profesia scienca nivelo, kaj tia certe estas *Blanke 2001 A*. Ĝi plenas de pensigaĵoj kaj celtrafaj informoj, kaj ne nur pri Eŭropo. Ekzemple, Mattusch (p 21) citas UNFPA-

ciferojn antaŭvidantajn ke en la jaro 2050 nek la franca, nek la germana, nek la itala lingvoj estos inter la 20 kvante plej uzataj lingvoj; ke anstataŭos ilin la turka, la persa, la amhara; ke eble la svahila anstataŭos la korean; kaj ke la angla estos en la tria loko, post la ĉina kaj la hinda. Li ankaŭ atentigas (p 20) ke ĝis 2050 oni timas ke la hispanparolanta parto de la usona loĝantaro povus kreski de la nunaj 10% al 25%! Kostomarov (p 55) citas informan ŝercon pri Ukrainio: la prezidanto de iu alta komitato demandas ĉu ĉeestas rusoj en la ĉambro. Ne? Do, ni diskutu ruse. Simon kaj Ullrich (p 154-7) donas liston de 37 praktikaj punktoj eliritaj de la sperto pri terminologia laboro. Fiedler (p 141-2) donas kelkajn belajn ekzemplojn de frazoj elgermanigitaj de *Faŭsto* kiuj povus fariĝi tiom konataj en Esperanto kiom ili jam estas germane:

*Jubilas ĉies ĝoja kri':
Ĉi tie, rajte, homas mi. (37)
kaj*

*Jes, tiusence mi nun konvinkitas,
Jen finkonklud' el saĝa sci':
Liberon, vivon homo nur meritas,
Se ilin perluktadas li. (190).*

Cetere, kiu povus kvereli kun la konkludo de Blanke (p 100): Se oni volas eviti estontajn konfliktojn en Eŭropo, endas demokrata formado de eŭropa lingvopolitiko, aparte kadre de EU.

Carlevaro 1998 komenciĝas per ampleksa (85-paĝa) kaj valorega artikolo de Detlev Blanke, *Pri la aktuala stato de interlingvistiko*. Krome ĝi enhavas kontribuojn pri Esploro sociologia pri la svisaj Esperanto-parolantoj (Carlevaro); La enciklopedia vortaro pri la inventitaj lingvoj (Silfer); S.B. Linde kaj lia provo krei interslavan esperanton (Chmielik); Pri la influo de gepatraj lingvoj al la verba morfologio en Esperanto (Dankova-Stackler); Pri la jida gramatiko de Zamenhof (Chmielik); Svisa Planlingva Enciklopedio (Künzli); Pri la rilatoj inter la svisaj kulturoj (Grosjean); Pri Erich Weferling kaj la konstruado de perfekta lingvo (Barandovská-Frank); kaj Studo pri terminologiaj aspektoj de Esperanto kaj naturaj sciencoj (Favre).

La artikolo de Blanke estas detala kaj atentema superrigardo de ĉio, kio okazis ĝis 1997 en la interlingvistiko en Eŭropo. Inter multaj interesaj punktoj li proponas (p 70) la starigon de scienca organizaĵo de interlingvistoj; substrekas ion tro ofte forgesitan, la faktoroj klarigantaj la relativan sukceson de Esperanto kaj la malsukceso de aliaj sistemoj krom la lingvaj algrade estas nelingvaj; kaj proponas bazon (p 71-5) por la ellaborado de interna kaj ekstera LIPEK (lingvopolitiko de la Esperanto-komunumo). La aliaj

kontribuoj estas multifacetaj kaj ĉiam interesaj. Indas menci kelkajn punktojn: la studo de Dankova-Stackler indikas ke nur ĉe la ruseparolantoj oni trovas psikologiajn verbojn prefiksatajn (ekscii, ekpensi), kaj ne ĉe la france- aŭ la italeparolantoj. Tio memorigas min pri la irlandaj lingvoj, kie ni havas malsamajn verbajn formojn por esprimi estas nun (tâ) kaj estas ofte (bionn), kiuj respondas ĝuste al la pola jest kaj bywa.

Barandovská-Frank sugestas tezon ke Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Neo kaj Intel estas dialektoj de la ununura *naturalisma latinido*.

Blanke 2001 B enhavas kontribuojn pri Giuseppe Peano kaj Latino sine flexione (Barandovská-Frank); Pri la strukturo

Fenestroj sur la hungaran poezion

Plej probable mi, poeto kiu sin vivtenas ĉefe per instruado lingva, neniam (el)lernos la hungaran. Pro tio mia fekunda danko al la tradukisto Tibor Papp, kiu havigas belajn fenestrojn sur la hungaran poezion.

Sur la altaro de Sundio. Napisten oltárán. Éva Kovács. El la hungara trad. Tibor Papp. Budapest: Püski, 1999. 87p. ISBN 963 9188 62 X. 20cm. Dulingva: E-hungara. € 4,80.

Sur la altaro de Sundio estas dulingva eldonaĵo. La kompleta hungara teksto lokiĝas unue. La Esperanta havas du prologojn far fakuloj. Nur la hungarlingvan tekston akompanas ilustraĵoj. Tiujn mi trovas ĉarmaj, certe taŭgaj.

Temas pri libro por homoj kiuj ŝatas kalevalojn, poeta sonĝo baze de prahungara originlegendo. Sed la rekonstruo estas pli teoria ol ĉe Lönnrot, kiel substrekas unu el la prologantoj, *nia praepopeo, bedaŭrinde, malaperis*. Tamen la ĉarma verko havas valoron propran; interalie, Éva D.

Kovács elstaras kiel vera majstrino de la hungara aleksandrino, uzita tre ofte de klasikuloj. Kaj en la traduko oni vidas ke Tibor Papp vere, lerte, kaj profunde regas E-on, ties ecojn kaj ercojn. Ja la versoj havas muzikecon kiuj pensigus ke oni originale verkis ilin verdingve.

Dibesto – la Mircervo – havas gravan rolon ĉi-rakontare, kune kun figuroj pli homecaj (ekz. la Sundio mem). La cervo posedas parol-kapablon: Sed ĝi ekparolas, la vortoj veluraj/papilaj flugas al koroj junulaj./ Min ne suferigu, jun-bravuloj belaj./ Mircervo mi estas el kampoj ĉielaj.

Temas pri malampleksa verko anstataŭ pri kalevalo dika. Tamen, pri volumo plenplena je ĉarmoj, vera trezoreto por folkloristoj, kaj kompar-literaturistoj.

Protestantaj magnolioj. Elektitaj poemoj. Sándor Beke (1961). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: E-Societo, 1999. 72 p. ISBN 963 03 8833 2. 21 cm. € 3,00.

Mi rekomendas *Protestantaj magnolioj* al tiuj, kiuj serĉas metaforajn novaĵojn, foran sed planan nunon en la poezia disfloro. Fakte la poemvolumon mi traiegis kun dankemo: Beke ja naskas juvelojn. Inter ili troviĝas *Fenestroj de l' poezio*, vera meta-poemo. Laŭ ĝi *La poezio/estas tombejoj/ de ubiaj epokoj/ kaj de ubiaj reĝoj*. Ĉi-poeme ankaŭ estas aserto kiu memorigas pri la ĉilia Vicente Huidobro kaj ties skolo de kre-poezio: *La poezio/ estas kreita mondo/ la genezo de la floroj kaj animoj/ patrolandoj kaj dioj*. Mi ankaŭ ŝatas:

kaj evoluo de Ido kompare al Esperanto (Anton); *Occidental kaj ĝiaj strukturaj apartaĵoj* (Back); *Pri la strukturo kaj evoluo de Interlingua* (Liebig); *Natureco kaj aŭtonomio en planlingvoj* – prezentataj ekzemple de la frazeologio (Fiedler); *La lasta instanco* (Bormann); *Strukturkomparo de Esperanto-idoj* – *Kie ekestas la kritikoj de Esperanto* (Günkel); *Loglan: Lingvo, logiko kaj socia realeco* (Fellmann); kaj *Pri la strukturo de eksterterulaj lingvoj* (Mannewitz).

Ĉiuj tri libroj estas legindaj. *Blanke 2001 B* pli taŭgas por la specialistoj, sed *Blanke 2001 A* legendas por ĉiuj esperantistoj kiuj interesiĝas pri la lingva kaj identeca flanko de Eŭropo, kaj kiuj scipovas legi la germanan.

Seán Ó' Riain

La poezio/ estas kronita malsano/ en vundoj/ de la mondo.

Alia bonega poemo en la kolekto estas *Vin mi serĉadas*. Temas pri scienc-poezio konstruita laŭ longa metonima kateno. Mi citu fragmenton: *mi serĉas vin en kernaj pteridojtoj/ de paleozoiko/ mi serĉas / vin en karapacoj prakankraj/ mi serĉas / vin en postrestaĵoj/ de brontosauroj*. La poeto serĉas Dion. La poemo ampleksas ses paĝojn.

La poemo *Sankta fajrero* estas tre mallonga: *Nia vivo/ estas/ sankta fajrero/ kiu foje/ eksaltos en la senlimon*. Kaj certe la volumo *Protestantaj magnolioj* enhavas multe pli da interesaj poemoj, de varia longeco.

Mia fenestro alĉiela. Elektitaj poemoj (1989-99). László Ötvös (1930). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: E-Societo, 2000. 53p. 21 cm. € 3,90.

Mia fenestro alĉiela plejparte pli banalas sur la tereno poezia. La loko de multaj el la poemoj estus la preĝejo, ne scienc-nivela poezi-konkurso. Mi citu ekzemple la kompletan tekston de *Jesuo sur maro*: *Jesuo sur akvo iras / li lernigas al mi paŝi / sur malpura ŝaŭm' de l' vivo*. Tralegante la volumon ni spertas tutan gamon de religiemaj sentoj. Ne surprize: Ötvös eĉ doktoriĝis pri teologio.

En la volumo ne ĉio tamen kirkecas. Poemoj kiel *La vekanta alaŭdo*, *Hirundoj*, kaj *Per mano rompita gestas ne dependas de la teologio por beli*. Mi citu el ĉi-last: *Olda arbaro kaŭras, grumbas / kaj ĉi folio pala, malsana/ al mi gestadas / la romp-it-mana*. Ötvös ankaŭ abunde prikantus la gloron de aliaj hungaraj

poetoj, inter ili Endre Ady.

Peter Browne

Notoj

Kre-poezio – La sudamerika skolo (ĉefverko: Altazor, de Huidobro) "postulis" ke poemo ne spegulu eksterajn realojn, sed ke ĝi kreu siapropajn.

Metapoemo – Poemo kies ĉefa temo estas la poezio mem, ties verkado: Ars Poetica.

Metonimo – La anstataŭigo de unu realo semantika per alia apuda aŭ simbola; ofte okazas katene (eĉ tre longe).

Ubio – La gloso al *Protestantaj magnolioj* klarigas ke la fikcia Reĝo Ubio "enkorpigas la region de etburĝa malvast-horizonteco".

NAVIGE Tra TTT-paĝoj

jen plurej
verdaj gutoj
el la informocean
de Tut-Tera Tekstoj.
Seiĝu nin pri pliaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



ARTO, MUZIKO:

E-lingvaj tekstoj de diversaj kantoj kaj muziko troviĝas ĉe: www.geocities.com/cigneto/thcind/kristnasko.html.

Nova KD: Elektronika Kompilo – 70 minutoj da aktuala elektronika E-muziko de 10 artistoj el 8 landoj. Mendilo (kaj pluraj) muzik-eltraĵoj: <http://www.vinilkosmo.com>.

FAKOJ, APLIKOJ:

Kosmo: TTT-paĝoj de la ĉiujara tutirlanda astronomia festivala semajnfino *Cosmos* en dulingva (angla-esperanta) versio: <http://www.iol.ie/~seanmck/tas.htm>.

Laboristoj: La TTT-ejo de Internacia Laborista Movado havas E-version: www.labourstart.org.

Mozilo: Programo ebliganta la uzon de la retfoliumilo Mozilla en Esperanto estas elŝutebla ĉe: <http://www.esperanto.org.uy/mozilo/>

Budhana Ligo E-ista, refondita dum la lasta UK, inaŭguris sian novan retejon: <http://esperanto.us/budhana.html>.

Opero: La retfoliumilo Opera ekde la versio 6.00 ĝuste traktas la unikodajn karakterojn. La programo estas senpaga, kaj oni povas ekhavi E-an vizaĝon (tradukon de ĉiuj menu-tekstoj) en la retpaĝo de Federico Zenith: <http://www.stud.ntnu.no/~zenith/indexesp.html>.

Sunenergio: Trilingva (E-a, franca, hispana) retpaĝaro pri kuirado per la energio de la Suno troviĝas ĉe: www.bolivainti.org.

HUMANISMO:

SPES: E-traduko de la TTT-ejo de humana asocio Soutien Pour l'Enfance en Souffrance – Subteno Por la Infanetaro Suferanta, pri helpo al orfaj infanetoj en Togolando. Ĉe la hejmpaĝo de la asocio <http://spesworld.free.fr/> vi trovos ligilon al la Esperanto-versio.

La Ligo Humanitas funkciigis novan retpaĝaron ĉe: www.adhumanitatem.com (kontaktdresno info@adhumanitatem.com 3).

INSTRUADO, LERNEJOJ:

Esperantaj lerniloj, interalie la tuta fama romaneto *Gerda malaperis*: <http://www.esperanto.org.br/eki/tekstoj>

Esperanto lernejen: dulingva komunikilo pri la centjarigo de la unua aplikado de E-o en internacia lerneja korespondado: <http://www.esperanto-sat.info>.

Reta E-kurso: Portugallingva versio de la E- Kurso de Esperanto de d-ro Marcelo Casartelli: <http://www.institutoesperanto.com.ar>.

Senpagaj lecionoj pri la rusa kaj la pola pere de E-o haveblas retpoŝte ĉe Massimo Ripani, rete: XenoItaly@hotmail.com.

IJUNULARO:

Aktivaj en TEJO: Kreiĝis nova retlisto de TEJO por faciligi serĉadon de taskoj, projektoj kaj helpantoj. Aliĝo ĉe: aktivaj-en-tejo-subscribe@yahoo.com. Proponoj sendeblas al taskoj@tejo.org (www.tejo.org/aktivuloj/listego.jsp)

Ijunularo Esperantista Svislanda informas en la propra retejo: <http://www.jesperanto.ch>

Skoltoj: Jen retpaĝoj kiuj interesos infanojn kaj ĝejnulojn: <http://ttt.esperanto.org/skolta/sm.html>. Temas pri la ret-bulteno de Skolta Esperanto-Ligo. La lasta numero estas printebla ĉe: <http://ttt.esperanto.org/skolta/sm2002.pdf>

Internacia Junulara Kongreso: Informoj kaj aliĝilo pri la 59-a IJK en Lesjöfors, Svedio, troveblas ĉe <http://www.tejo.org/ijk>. Ĉe: <http://www.tejo.org/ijk/paligxilo.php> vi povas elŝuti la paperan aliĝilon kaj la varbafiŝon.

La novaĵletero TEJO-aktuale nun legeblas kaj aboneblas ankaŭ per la servo ĉe Abonu.com: <http://abonu.com>.

Reta Informad-Centro: TEJO instalas novan retejon pri informado (informiloj por elŝuti, oftaj demandoj pri E-o, forumo...): <http://www.ikso.net/ric/>

KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ:

Dua bulteno de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo troveblas ĉe: <http://www.uea.org>.

Medicinistoj: Informoj pri la konferenco de medicinistoj troveblas ĉe: <http://www.esperanto.ro/imek.html>

KURSEJOJ:

Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato de Poznań (Pollando) havas novan retejon: <http://main.amu.edu.pl/~inter/index.html>

Kastelo Grezjono, Francio: diversgradaj staĝoj. Informoj ĉe <http://grezjono.kastelo.free.fr>

LANDOJ, REGIONOJ:

Irlando: EAI (la Esperanto-Asocio de Irlando) nun havas du hejmpaĝojn kun multaj temoj kaj ligoj: www.esperanto.ie kaj www.iolie/~carsfrm.

KAEM: La Komisiono pri Azia E-Movado de UEA en decembro 2002 modifis sian TTT-ejon: http://www.2s.biglobe.ne.jp/~jei/kaem/kaem_kap.htm.

Norda Koreio uzas Esperanton. Temas pri paĝo de la Asocio pro Amikeco kun Koreio: <http://www.korea-dpr.com>.


Kroata Esperanto-Ligo havas novan retejon: <http://free-zg.hinet.hr/esperanto/>.

Kartvelio: Esperanto-retpaĝoj pri la kartvela E-vivo: www.geocities.com/abuladze_2000/start.htm.

Daŭrigota venontnumere, kompilis Stano Marček

Netskapo en Esperanto

La versio 7 de la retfoliumilo *Netscape* ebligas ankaŭ elekton de Esperanto inter diversaj lingvoj por la preferoj: modifi -> preferoj -> navigilo -> lingvoj: klaki aldoni kaj elekti Esperanto (Eo). Eo respondas al la ISO-kodo por Esperanto.



Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

ABC en Esperanto. Charlotte Kohrs. Ilus. James Faughnan. San Diego: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 1994. 30p. 28cm. Kvazaŭa aboco-libro, kiu instruas la Esperantan alfabeton per infanstilaj desegnaĵoj. € 5,40

Aventuroj de Pinokjo, La. Carlo Collodi. El la itala trad. Jozefo Horváth. Antverpeno: FEL, 2003. 156p. ISBN 90 71205 91 6. 21cm. Desegnaĵoj de Enrico Marzanti. Nova E-versio de la por-infana klasikaĵo. € 9,90

Bela planedo, La. Demando kaj respondo! Charlotte Kohrs. San Diego: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 1992 (2-a eld.). 16p. 21cm. Ilus. de infanoj. Laborigaj kaj paroligaj tekstoj por infanoj. € 1,20

Bonvenon, amiko! Ĉu vi parolas Esperanton? Kompreneble! San Diego: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 1989. 12p. 22cm. Per propraj desegnaĵoj, infanoj instruas Esperanton al aliaj infanoj. € 1,20

Dek demandoj. Lerno-libro por infanoj 7- ĝis 14-jaraj. Charlotte Kohrs. San Diego: Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, 1994. 45p. 28cm. Ilustris infanoj. Ringe bind. 10 ilustritaj lecionoj kun, ĉefine, sugestoj por instruantoj. € 9,90

English-Only Europe? Challenging Language Policy. Robert Phillipson. London: Routledge, 2003. 240p. ISBN 0 415 28807 X. 22cm. Anglalingva. Profunda kaj serioza rigardo al la nuna stato de la eŭropa lingva situacio, kun sobra analizo de ĝiaj kaŭzoj kaj efikoj. € 21,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - manual de limba internațională. R. Imbert, I. Spoljarec, S. Štivec, Z. Tišljari. En la rumanan trad. I. Onet. Cluj-Napoca: Grinta, 2003. 64p. ISBN 973 7924 01 01. 21cm. Lernolibro laŭ la zagreba metodo por rumanlingvanoj. € 3,00

Esperanto - poŝa lernilo. Antanas Mekys. Vilnius: La aŭtoro, 2001. 64p. 15cm. Poŝformata lernolibreto; 12 lecionoj. € 3,00


Esperanto para principiantes. Aloisio Sartorato. Rio de Janeiro, 1991. 78p. 23cm. 16-leciona lernolibro. € 7,20

Fore de Parnaso. A. Mekys. Vilnius: La aŭtoro, 2002. 56p. 15cm. Modest-

Enkonduko en Esperanton por svedlingvanoj. € 3,30

Jarkolekto Esperanto 2002. Rotterdam: UEA, 2002. 264p. ISSN 0014 0635. 27cm. 11 numeroj. € 25,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Litovio dum jarcentoj. Ilustrita historia skizo. Petras Čeliaskas. Kaunas: Litova E-Asocio, 2002. 144p. ISBN 9986 10 110 7.




aspekta originala poemaro. € 3,00

Interlingvistikos ĵvadas. Aloyzas Gudavičius. Šiauliai, 2002. 102p. ISBN 9955 418 97 4. 21cm. Enkonduko en interlingvistikon por litovlingvanoj. € 6,00

Introduktion till Esperanto. Bertil Nilsson. Stockholm: Eldona Societo Esperanto, 2002 (3-a eld.). 28p. ISBN 91 89432 04 5. 21cm.

Morgaŭ denove ni vidu. Simon Carmiggelt. El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Antverpeno: FEL, 2002. 128p. ISBN 90 77066 05 5. 21cm. Fasko da rakontoj kaj historiotoj el la plumo de unu el la plej popularaj nederlandaj aŭtoroj en la 20a jc. € 9,90



20cm. Abunde ilustrita historioto de la lando kie okazos la 80-a UK. € 6,00

Vivas balsas visam pasauliui. Leizeris Zamenhofas, Esperanto kūrjās. Vitaliano Lambert. El la itala trad. A. Gudaitis, I. Tuliševskaitė Vilnius: Alma littera, 2002. 448p. ISBN 9955 08 206 2. 21cm. Bind. Ilus. Litovlingva versio de la itala biografio de Zamenhof *Una voce per il mondo*. € 24,00

Vivo de Andreo Cseh. Ed

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 2003. Rotterdam: TEJO, 2003. 210p. ISBN 83 900118 7 5. 16cm. Mapoj. Kun 1286 adresoj en 80 landoj. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Penso kaj vivo. Diktita de la Spirito Emmanuel. Francisco Cândido Xavier. El la portugala trad. A. Borges Gallego Soares. Rio de Janeiro: SES F.F. Lorenz, 2000. 129p. ISBN 85 86984 13 2. 16cm. Informlibro pri la principoj de la Spiritisma Doktrino. € 4,20

Revenis mi. Serge Sire. Thaumiers: La Kancer-kliniko, 2003. 28p. ISSN 0398 5822. 30cm. Bildstriaro, nek pruda nek deca, sed altkvalita. € 4,50

Svajotojas. Apybraiža apie esperanto kalbos kūrjās Liudviką Zamenhofą. A. Dambrauskas-Jakštas. P. Čeliaskas. Kaunas: Varpas, 2002. 93p. ISBN 9986 10 106 9. 15cm. Ilus. Litovlingva. Biografieto de L.L. Zamenhof, kun aldona kapitolo E-lingva pri Zamenhof kaj Litovio. € 4,50

Turismo de Liuzhou. Guide for Liuzhou Travel. Lan Tianqiang. Liuzhou: Lijiang, 1995. 120p. ISBN 7 5407 1870 6. 19cm. Ilus. Trilingva (E, angla, ĉina) gvidlibro pri la sudĉina urbo Liugoŭ. € 3,00

Unuaj paŝoj. Elvira Fontes. São Paulo: Amikoj de Esperanto, 2001 (7-a eld.). 100p. ISBN 85 85795 48 8. 21cm. 15-leciona ilustrita kurso por portugallingvanoj, kun vortareto post ĉiu leciono. € 9,90

Vivas balsas visam pasauliui. Leizeris Zamenhofas, Esperanto kūrjās. Vitaliano Lambert. El la itala trad. A. Gudaitis, I. Tuliševskaitė Vilnius: Alma littera, 2002. 448p. ISBN 9955 08 206 2. 21cm. Bind. Ilus. Litovlingva versio de la itala biografio de Zamenhof *Una voce per il mondo*. € 24,00



Loke



★ **POLLANDO:** En la urbo Łódź estas strato D-ro L. L. Zamenhof. Ĝi ekzistas ekde 1920 (*Enciklopedio de Esperanto*, p. 515). Dek jarojn poste, en septembro 1930, okazis en Łódź la Kvara Tutpola Kongreso de Esperanto. Pro tio estis fiksita sur domo de la strato Zamenhof dulingva memortabulo. Komence de la dua mondmilito lodza esperantisto malforkis la tabulon kaj kaŝgardis ĝin dum la tuta milito. En 1946 ĝi estis denove fiksita samloke. Nun ĝi estas videbla en la loka Muzeo de la Urba Historio. La kuraĝa esperantisto, kiu savis la memortabulon kaj la aŭtoro de la supra foto estas nekonataj. Ev. informojn eblas anonci al la komisiito pri ZEO-j: Raymond Boré, 481 Square Zamenhof, FR-73000 Chambéry, Francio, tel./faksilo + 33 479724413.

★ **HISPANIO:** La 10-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazis en oktobro 2002 en Cambrils, Taragona. Partoprenis 65 esperantistoj, duono el Francio. Okazis du tuttagaj ekskursoj, estis prezentitaj novaj libroj *Esperantismo*, *Prelegoj kaj Eseo* de G. Moya, *Vortaro 2002* de M. Gutiérrez, *La Nova PIV*, reviziita de Duc Goninaz, okazis i.a. E-kurso kaj E-ekzameno de S. Aragaj, kvar prelegoj de Luis Serrano, Marco Botella, Rafaela Urueña kaj Renato Corsetti (la lasta pri UEA – faktoj kaj celoj).



★ **EKSPOZICIO:** En 2004 la Esperanto-Centro de Angers en Francio festos la 100-an datrevenon de la grupo, kaj okazigos ekspozicion de infanaj desegnaĵoj pri la temo *daŭra disvolvigo* (naturprotektado, lukto kontraŭ polucio, suna energio, sana agrikulturo, pura akvo, sanprotektado...). La plej belaj desegnaĵoj estos premiitaj. Informoj: Esperanto-Centro, A. Frangeul, 6 rue du Buis, FR-49000 Angers, Francio, rete: bertrand-gilet@wanadoo.fr



★ **TEATRO:** En la Esperanta Teatra Sceno Areno, kiu jam du jarojn regule spektaklas ĉe Urbocentra Kulturdomo en Krakovo, Pollando, aktoristoj surscene jam pli ol cent personoj. La spektaklojn, kiuj okazas regule la unuan lundon de ĉiu monato en la krakova urbocentro (str. Mikolaŝka 2), jam vizitis televido, skribis pri ĝi *Gazeta Wyborcza* kaj la spektejo estas ĉiam plena. Ĝia iniciatinto kaj gvidanto estas honora membro de UEA Jadviga Głębicki (os. 1000-lecia 7/89, PL-31-604 Kraków, Pollando, rete: lameli@lameli.com.pl).

lernantoj frekventis bazan E-kurson, ke la tria eldono de Baza Kurslibro de Esperanto aperos ĉi-jare, ke bone laboras IEM – Islama Esperanta Movado. Estis elektita nova estraro de PakEsa, kies nova prezidanto estas Bashir Bhatti Bhervi (sur la foto), kiu gvidos grupon, partoprenontan la 88-an Universalan Kongreson en Svedio.



★ **BARATO:** 600 000 mezlernejaj lernantoj en la tuta lando nun povas legi en siaj lernolibroj de la angla lecionon pri Esperanto, Zamenhof, pri facileco kaj uzado de Esperanto, kun pozitivaj informoj kaj koloraj ilustraĵoj.

★ **INTERLINGVISTIKO:** Fine de 2002 universitato de Ŝiauliai en Litovio eldonis libron de prof. Aloyzas Gudavicius, prezidanto de ĝia Senato kaj vicprezidanto de Litova E-Asocio. La libro *Interlingvistikos ivadas (Enkonduko en interlingvistikon)* estas lernolibro por studentoj. La 104-paĝa libreto prezentas kutimajn aferojn de interlingvistiko, la multlingvecon de la mondo, diversajn projektojn de internaciaj lingvoj k.s. Pli vaste estas prezentita Esperanto, la E-movado kaj ĝia evoluo, eĉ baza gramatiko de Esperanto, eventualaj solvoj de internacia lingvoproblemo k.a. Enestas kelkaj tekstoj en Esperanto. Aĉetebla en la libroservo de UEA (6 eŭroj).



★ **SMAIL GRBO:** Siajn 40 jarojn de esperantisteco "Caro Smajlo", kiel nomas lin geamikoj, festis per novaj sukcesoj: *La Federacia Televido BkH* filmis kaj prezentis pri li 30-minutan dokumentan filmon sub la titolo *Esperanto*, kvankam Smajlo estis prezentita ne nur kiel esperantisto, sed ankaŭ kiel instruisto, publicisto, mondvojaĝanto, hobiisto kaj posedanto de E-muzeo. Grbo en la filmo parolas ankaŭ Esperante kaj la filmo estis prezentita sur ambaŭ kanaloj de FTV. Krome li gastis du horojn en la plej aŭskultata elsendo de *Radio B-H 1* kaj ĵurnalo *Expres* aperigis pri li tutpaĝan artikolon en la rubriko *Neordinaraj homoj*.

Oficiala informilo



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Roberto Vieira Resende. **Ĉinio:** Xiao Peiliang. **Francio:** Bert Schumann. **Japanio:** Nachiko Nishimura.

PATRONOJ DE TEJO 2003

Argentino: Rodolfo G. Calógero. **Belgio:** Stella De Weerd. **Britio:** Martin Hugh McClelland. **Finnlando:** Heta Kesälä; Tiina Oittinen; Anna Ritamäki; Päivi Saarinen. **Francio:** François Bartsch; Pierre Cheynet; Denis-Serge Clopeau; François Dher-signerie; Denise Loisel; Claude Longue Épée; Odile Masseron; Monique Moulin; Paulette Naulet. **Germanio:** Franz Knöferl; Gisela Macioszek; Rokuro Makabe; Franziska M. Reisel; Maria Vitalyos. **Italio:** Gianfranco Polerani. **Japanio:** Kodama Hiroo; Kazuyuki Hosomi; Utako Kobayasi; Simada Sunao. **Nederlando:** M.Dee; Miny Massar-van Diepen.

SOCIETO ZAMENHOF 2003

Aŭstrio: H. Maschek-Stamm; **Belgio:** Karel Van Steenberghe; Jos Vandenberghe; Marie-Louise Vanherk; Stella De Weerd. **Brazilo:** Gilbert René Ledon; Symbilde Schenk Ledon; Álvaro Rabêlo. **Britio:** Samuel Kaufmann; Sybil Sly. **Bulgario:** Olga Gerasimova. **Danio:** Ejnar Hjorth. **Finnlando:** Liisa Bergman; Heta Kesälä; Harri Tuomola. **Francio:** André Albault; François Bartsch; Jean Bartsch; André Loisel; Denise Loisel; Claude Longue Epee. **Germanio:** Elfriede Blasius; Werner Bormann; Helga Erhard; Helmut Klünder; Albrecht Kronenberger; Elfriede Kruse; Gisela Macioszek; Rokuro Makabe; Alexander

Putre; Michael Scherm; Heinz Schindler; Claude Tresorier; Helmut Welger; Julie Winter. **Italio:** Clara Gubbioli Carioli. **Japanio:** Kazuyuki Hosomi; Akira Morita; Kōiti Simizu; Simada Sunao; Sugano Takeo; Kuroyanagi Yosita. **Luksemburgio:** Brian R. Moon; Claude Nourmont. **Nederlando:** P.H. Damsté; G.F. Makkink; Miny Massar-van Diepen. **Svedio:** Sture Andersson; Martin Häggström; Gunnar Olsson. **Venezuelo:** Peter R. Jaimez Ostos.

DONACIOJ 2003 (EUR)

ĝis la 28-a de februaro

Kapitalo Afriko: **Aŭstralio:** K.E. Enderby 100,00. **Nederlando:** Esperanto Nederland 400,00; W.A. Massar 2319,62; Fam. H. ten Hagen 500,00; F.D. van Zoest 12,50. *Sumo ĉi-jara: 4485,03.*

Fondaĵo Afriko: **Francio:** L. Lentaigne 50,00. **Japanio:** T.Doi 76,95; T. Ono 7,69; M. Tahira 38,48; anonime 76,95. **Nederlando:** A. Beuzenberg 25,00. **Svislando:** D. R. Rooke 38,00. *Sumo ĉi-jara: 569,57.*

Fondaĵo Ameriko: **Germanio:** C. Altrogge 50,00. *Sumo ĉi-jara: 75,00.*

Fondaĵo Azio: S. Aikawa 30,78; T. Doi 76,95; Y. Gotou 15,39; K. Hayasi 15,39; T. Honda 38,48; T. Kaba 15,56; U. Kobayasi 23,09; Y. Mine 15,39; I. Miyamoto 15,56; Y. Mizuno 38,91; S. Mori 153,91; M. Nisida 15,39; N. Nisimura 15,56; T. Nisio 15,56; T. Ono 15,39; A. Saiki 30,78; T. Sugihara 15,57; Y. Takeuti 30,78; M. Takezaki 15,39; S.

Turuta 20,00; S. Watanabe 15,56; T. Yamada 15,39; S. Yosikawa 15,39. *Sumo ĉi-jara: 870,04.*

Fondaĵo Canuto: **Francio:** J.J. Aumeunier 50,00; L.M. Berthelin 50,00; F. Ditacroute 26,00; R. Fabre 20,00; R. Gode 30,00; A. Hubert 20,00; D. Hubert 40,00; C. Lavarenne 18,00; C. Longue Épée 50,00; L. Marin 50,00; O. Masseron 45,00; M. Savignat 18,00. **Germanio:** G. Macioszek 150,00. **Nederlando:** A. Beuzenberg 50,00; A. E. Moerbeek-Prins 50,00. **Novzelandio:** G.D. Dewar 51,39. *Sumo ĉi-jara: 968,39.*

Konto Espero/Lingvo de Paco: **Egiptio:** R. Lecat 45,13. **Francio:** Parisot-Delourel 30,00. **Japanio:** K. Murata 76,95. *Sumo ĉi-jara: 268,14.*

Konto Etiopio: **Aŭstralio:** K.E. Enderby 47,55. **Francio:** J.-P. Boulet 40,00; J.-M. Parisot-Delourel 30,00. **Nederlando:** A. Schouten-Buys 35,00. *Sumo ĉi-jara: 428,98.*

Junulara Fondaĵo: **Jugoslavio:** Vera Mandarić 10,00. *Sumo ĉi-jara: 352,85.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo:

Finnlando: E. Societo Antaŭen 35,00 (por Nepalo). **Francio:** J. J. Aumeunier 48,00; R. Durant 30,00; C. Longue Épée 50,00; L. Marin 50,00; M. Savre 10,00. **Germanio:** W. Ehlers 10,00. **Nederlando:** Esperanto Nederland 100,00 (por Nepalo). *Sumo ĉi-jara: 418,00.*

Volontula Fondaĵo: **Nederlando:** W. Akkerman 23,00; A. Beuzenberg 50,00. *Sumo ĉi-jara: 123,00.*

Ĝenerala Kaso: **Britio:** D.H. Withey 27,73. **Nederlando:** G.F. Makkink 200,00. *Sumo ĉi-jara: 308,91.*

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

89

Laste aperis

Borsboom. Hago: IEI, 2003. 313p. ISBN 90 805651 2 1. 21cm. Ilus. Ampleksa biografio de la kreinto de la rekta metodo. € 18,00

KOMPAKTDISKOJ, KASEDOJ, MAPO

Afrika nokto. Dennis Rocktamba. Oberkochen: La aŭtoro, 2001. 25 min. Kvin pecoj forte influitaj de kariba kaj afrika muziko. KD: € 15,00; kasedo: € 7,50

Akceptu, mondo, nin amike! Elena Puhova. Praha: La aŭtoro, 2002. 41 min. Kun tekstfolio. Dekduo da kantoj laŭ tekstoj de Mikaelo Bronštejn, kun instrumenta akompano. KD: € 13,50

Elektronika kompilo. Aktuala elektronika muziko en Esperanto. Donnevill: Vinilkosmo, 2002. 71 minutoj da elektronika muziko, ritmo, dancebla; 16 muzikaĵoj, kies tekstoj aperas en akompana 12-paĝa broŝuro. KD: € 19,80

Mondmapo. Calgary: Esperanto antaŭen, 2003. 100x62cm. Politika mondmapo plurkolora. € 9,90

Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpk (€ 0,75). Ni ne respondas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Korespondanta Servo Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.



Fariĝu konscia subtenanto de TEJO!

Fariĝu patrono de TEJO! Pagante trioblon de via landa MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas: *Kontakt*, *TEJO-tutmondo*, akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso, aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn. Informiĝu ĉe: <http://www.tejo.org/membreco/patrono.jsp>

Multjara esperantisto manskribis franc-lingvan libron *Le bréviaire de l'homme du 3ème millénaire*. Li serĉas iun kiu bonvolos tajpi ĝin por li. J.M. Mboge Mbele, B.P.1816, Douala, Cameroun, retadreso j_mboge@yahoo.com



ĜUSTIGO

★ **Koboldo atakis** la indikojn pri la aranĝoj en Ĉeĥio en nia marta Kalendaro. Jen la precizigo: La adreso kaj kontaktoj por la sekvaj aranĝoj: Petro Chrdle, KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, ĝusta tel. +420 257 712 201, fakso +420 257 712 126, rete chrdle@kava-pech.cz

IBIRE (biciklista renkontiĝo) ĉijare **ne okazos**. Interesatoj por la venontjara tamen povas antaŭlaŝi.

12-18.7. EKOTUR (Ekoturisma renkontiĝo) en Bohemia Karsto (Karlštejn)

19-25.7. Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Prago. Temo: *Intimaj temoj en Esperanto-beleto*.

★ **En la artikolo pri la japana poŝtkarto** en la ĉi-jara marta numero (p 69) troviĝas (mal)granda eraro pri la donacita sumo de japanaj esperantistoj: 5250 enoj devas esti 5250 eŭroj (= ĉ. 682 500 japanaj enoj), do 130-oble pli :-).

La redaktoro pardonpetas



Porpaca manifestacio en Rio



La 15-an de februaro 2003 esperantistoj el Rio-de-Ĵaneiro partoprenis en la porpaca manifestacio en Copacabana kun miloj da pacaj batalantoj. Ili portis Esperantajn flagojn, afiŝojn, disdonis prospektojn pri Esperanto, salutis ĉe mikrofono la partoprenantojn nome de esperantistoj kaj donis intervjuon al Radio CBN, la plej grava novaĵ-stacio de Brazilo. (Aloísio Sartorato)

Nemoveblaĵoj, lernejoj, pokaloj

Kiel funkciigi E-societojn kaj helpi la movadon? En Kroatio la problemoj estas financaj. Kaj aktivaj esperantistoj estas rara specio, kiu devas esti leĝe protektata.

Membrokotizoj sufiĉas eĉ ne por travivado. Junaj homoj forlasas nin post fino de kurso. Kion oferti al ili?

Nia movado bezonas materian bazon por agi. La plej stabilaj estas nemoveblaĵoj. E-Societo en Rijeka, Kroatio, posedas konstruaĵon en apudmara

urbeto Kostrena, proksime de Rijeka. Kunlaboro kun skoltaj estis fondita *Skolta Restadejo Esperanto-Domo*. Tiu kunlaboro ebligas al la societo financon sekurecon kaj la Esperanto-domo taŭgas por organizi Esperantajn renkontiĝojn. La lastan semajnfino en majo en la



Surstrate kaj rete

Sian sintenon al la milito esprimis esperantistoj per partopreno en porpacaj manifestacioj tra la tuta mondo. Pluraj E-asocioj publikigis rete siajn starpunktojn. Jen unu el ili el Belgio:

La Belga Esperanto-Federacio, kupola organizo de Asocio Por Esperanto en Valonio, *Brusela Esperanto-Grupo* kaj *Flandra Esperanto-Ligo*, kondamnas ĉian agreson, atakon kaj militon kontraŭ homoj kaj popoloj, ie ajn en la mondo, kaj do ankaŭ kondamnas la militon en Irako, same kiel la perforton de la homaj rajtoj fare de la iraka reĝimo kaj ties sinteno antaŭ la milita konflikto. BEF esperas ke baldaŭ finiĝos tia netolerebla milito, kaj ke la paco denove venkos, ne nur en Irako.

Eŭropa Ponto kaj Esperanto


La 15-a de marto estas nacia festo de la libereco en Hungario. Ĉijare la hungara registaro, okaze de la festo, kunmuntigis en la centro de Budapeŝto provizoran flosponton sur Danubo inter la du urbopartoj Buda kaj Peŝt, nomatan **Ponto Eŭropo**, simboligantan la Ponton al la Eŭropa Unio.

La ponto estis vespere lumigita per lampoj kaj torĉoj. Esperantistino Maria Hiripi proponis kaj Lajos Molnár tuj rete disanoncis, ke esperantistoj skribu en la memorlibregon de la Eŭropa Ponto ion pri sia dezirata pontolingvo de Eŭropo: Esperanto.

Mi mem skribis en la memorlibregon hungare kaj Esperante: *Vivu Esperanto, lingva ponto de Eŭropo*.

Neatendite fotisto kaj raportistino de la ĵurnalo *Blikk* petis permeson foti la enskribaĵon kaj intervjuis min por la ĵurnalo.

Ottó Haszpra



Ekzameno pri Esperanto sur teraso de Esperanto-Domo

92 Esperanto-Domo okazas konkursoj pri scio de Esperanto por lernantoj 10- ĝis 15-jaraj. La lernejoj mem pagas la

Kontakt-adreso: Esperanto-Societo Rijeka, Korzo 2A, HR 5100 Rijeka, Kroatio, rete esperanto-ri@tel.hr
Emil Hrvatin

E-somero en bela orienta Usono

Vicprezidanto de UEA Humphrey Tonkin, kiu estas samtempe estrarano de la Universitato pri Internacia Lernado, atentigas pri unika okazo lerni Esperanton en internacia etoso en la montoj de Novanglio.

Ĉu vi partoprenis la kursojn pri Esperanto en la Sanfranciska Universitato? Tiu ofta demando inter esperantistoj montras kiel influaj kaj kiel kontinuaj estis tiuj kursaroj, per kiu amaso da Esperanto-parolantoj, de Japanio ĝis Francio kaj de Argentino ĝis Kanado, eklernis la lingvon aŭ pliperfektigis sian scion, samtempe vizitante Kalifornion.

Sed ĉu vi scias, ke pasintjare la kursoj pliproksimiĝis al Eŭropo, nome, ke ili transmigis de la universitato en Sanfrancisko al alia rendevuloko, t.e. la Universitato pri Internacia Lernado (*School for International Training, SIT*) en Brattleboro en la ŝtato Vermonto?

SIT estas malgranda universitato por magistrat studentoj, kiuj poste sekvos karierojn kiel lingvoinstruistoj, gvidantoj de neregistaraj organizaĵoj, funkciuloj de internaciaj help-servoj, diplomatoj k.s. Ĝi ankaŭ estas la sidejo de unu el la plej grandaj internaciaj organizaĵoj por la interŝanĝo de lernejoj, la t.n. *Eksperimento pri Internacia Kunvivado* (*Experiment in International Living*), kaj de granda programo por eksterlandaj studoj por usonaj studentoj. Ĝi delonge simpatie rilatas al Esperanto: jam antaŭ 35 jaroj oni pretigis ĉe SIT sonbendan kurson pri Esperanto por parolantoj de la angla.

Kontraste al tiu universitato en la kalifornia grandurbo Sanfrancisko, Brattleboro estas kampara urbo en unu el la plej belaj regionoj en tuta orienta Usono. Nu, paroli pri aro da kampoj estas eble iom misgvida, ĉar la koncerna loko troviĝas inter la verdaj

montoj de Vermonto, kovritaj de riĉaj arbaroj, kie oni povas vagadi en la sunaj tagoj de somero – se hazarde oni ne vizitas la pitoreskajn urbetojn de la regiono, kun ties blanke farbitaj lignaj domoj, ĝiaj preĝejoj, kaj ĝiaj verdaj kaj bluaj riveroj.

Ĉi-somere, la kursoj daŭros de la 7-a ĝis la 25-a de julio. Ili havos tri nivelojn: la t. n. postbazan (por homoj kun tre baza scio de Esperanto), mezan (progresantan) kaj superan. Gvidos tiujn kursojn internacia teamo de instruistoj de alta kvalito. Ĉiuj kursoj estas malfermaj ankaŭ al neparolantoj de la angla lingvo.

Pasintjare, kiam por la unua fojo la kursoj okazis ĉe SIT, la tieaj profesoroj pri lingvoj miris pri la kvalito kaj

intenseco de la komuna vivo de la esperantistoj dum ilia restado. Ili ne nur kune manĝis kaj babilis, sed estis tuta programo de komunaj aktivaj, ekskursoj k.s., kaj ili averse insistis paroli nur Esperanton. Samtempe, tamen, la kursanoj havis okazon terurilati kun aliaj grupoj de anoj de specialaj kursoj kaj seminarioj el ĉiu angulo de la mondo: SIT estas ja tre internacia medio, kaj ĝiaj vizitantoj estas ofte homoj, kiuj dividas kun la esperantistoj interesiĝon pri paco kaj internacia kunlaboro.

Oni atingas la urbon Brattleboro el Eŭropo plej facile per la internacia flughaveno de Bostono. Aŭtobusoj transportas la vizitantojn de Bostono al Brattleboro. Sed, se oni venos kelkajn tagojn pli frue, oni ankaŭ povos partopreni la landan Esperanto-kongreson, kiu coincide okazos en Bostono de la 4-a ĝis la 6-a de julio, do tuj antaŭ la komencdato de la kursaro. Bostono certe estas konata al ĉiuj homoj kiel la lulilo de la Amerika Revolucio kaj kiel granda kolonia urbo, kiu tre bone konserviĝis, tiel ke abundas historiaj vidindaĵoj kaj muzeoj. Nelaste, la urbo estas granda centro de supera edukado: la universitatoj Harvard kaj MIT ambaŭ troviĝas en la proksimeco, kaj ĉi-lastaj gastigas la kongreson.

Por ricevi pli da informoj pri la kursoj, turnu vin al www.esperanto-usa.org/nask/. Por informoj pri la landa Esperanto-kongreso, iru al: <http://ttt.esperanto.org/ELNA/kongreso2003/> aŭ turnu vin al la kunordiganto de la kursaro, s-ino Ellen Eddy: eddyellen@aol.com.

Bonan vojaĝon al Boston, Brattleboro kaj Esperantujo!

H.T.



LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO, 55210 CREUE, FRANCIO
lagazeto@osiek.org
http://www.lagazeto.com

Krucenigma konkurso

Nova krucenigo aperos en la maja numero. Solvo el la decembra revuo: *Sciencan oni ne mendas, klerecon oni ne vendas.*

La solvojn sendis: Gerrit Brons (Nederlando), Marc Bavant (Francio), Gérard Labasthe (Francio), Jackie Huberdeau (Francio), Luiza Marin (Francio), Roland Larsson (Svedio), Jean Pierre Vanden Daele (Belgio), Sonja Brun (Svislando), Pieter Jan Doumen (Belgio), Bert-Horst Schumann (Francio), Dezusto Frankleno (Nederlando), Dieter Dungert (Germanio), Christian Rivière (Francio), Christoph Brandes (Germanio), Karin Lencki (Germanio), Adolf Burkhardt (Germanio), Vladimir Gakalenko (Ukrainio), Albrecht Kronenberger (Germanio), Nora Caragea (Germanio), Manuel Casanoves (Hispanio), Adayama Tooru (Japanio), Martin Purdy (Nov-Zelando), Germain Pirlot (Belgio), Horst Vogt (Germanio), H. W. Grossmann (Svislando), Jean-Marie Ries (Luksemburgio), František Štoviček (Ĉeĥio), J. Pierre kaj Monique Garden (Francio), M. Paul Lafont (Francio), Denise Hubert (Francio), Odile Masseron (Francio), Erkki Kemppainen (Finnlando), Ronald Cuenot (Francio), Mihailo Nešić (Jugoslavio), Angus Wilkinson (Britio), Julian Ducrocq (Francio), Kitty Sicherman (Israelo), Kees Neef (Nederlando), Alfonso Soares (Brazilo), Anja Karkiainen (Finnlando), Edmund Grimley Evans (Britio), Jean-Luc Tortel (Francio), Fidel Martínez (Meksiko), Valentin Melnikov (Rusio), Zdeněk Hršel (Ĉeĥio), Vlastimil Kočvara (Ĉeĥio), Peter Kühnel (Germanio), Grethe Kvist

(Danlando), Dieter Rooke (Svislando), Gillian Cartledge (Britio), Neil MacKilligin (Britio), Ronald Gates (Aŭstralio), Werner Bormann (Germanio), Will White (Usono), Béla Medgyes (Hungario), R. Anita Garibaldi (Brazilo), Aira Röntynen (Finnlando), José Mauro Progiante (Brazilo), Malcolm Jones (Britio), Juri Petrovič Kivajev (Rusio), Hazel Green (Aŭstralio), Jian Weijian (Ĉinio), Keyhan Sayadpour (Irano), Carlos Eduardo de Oliveira (Brazilo), Rune Moln (Svedio), Vincente Durco (Brazilo), Vitalij Pravilov (Rusio), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Juan Jacobo Schmitter-Soto (Meksiko), Richard E. Wood (Usono), Celio A. S. Brandão (Brazilo), Neal McKown (Usono). **La libropremion gajnis:** Béla Medgyes el Hungario. – **Elkoraĵo** gratulon al la gajntito!



forpasis

Ethel Alexander (1913-2002), dumviva membro de UEA kaj de Kanada E-Asocio, forpasis aŭguste sur insulo Vancouver.

Brian Curry (1947-2002), ĉefdelegito por Aŭstralio (1992-2002), sekretario (1988-94) kaj poste vicprezidanto (1995) de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio, mortis la 7-an de oktobro en Sidnejo.

Langkilde Ejnar (1911-2003), delegito por Nivá (Danlando), mortis la 17-an de januaro.

Aldo de' Giorgi (1924-2003), honora membro, forpasis la 19-an de januaro en Pisa (Italio). Li estis komisiito de UEA pri kulturo (1977-80), ano de ties kultura konsilio (1978-80), juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA (1981-98) kaj organizanto de literaturaj konkursoj. Akademiano (1986-98), ano de la juĝkomisiono de Fondaĵo Grabowski (1990 - 2003). Redaktoro de la landa revuo *L'esperanto* (1979-88). Dum dudeko da jaroj (ĝis 1996) literatura redaktoro de *Heroldo de Esperanto*. Aŭtoro de poemaro *Pretertempo* (1982), redaktoro de la plena poemaro de William Auld *En barko senpilota* (1987).



Hans ten Hagen (1932 - 2003), delegito, komitatano A kaj membro de la Komisiono pri Financoj, diplomita Cseh-instruisto, mortis la 14-an de marto en Heerhugowaard (Nederlando). Li en 1982 membrigis en Nederlanda E-Asocio kaj ĝia sekcio en Alkmaar, en 1985 fariĝis ties sekretario kaj kasisto, dum pluraj jaroj li redaktis la sekcian bultenon *La Promaĝokloŝo*. Kunlabore kun Internacia E-Instituto en Hago li organizis la ĉiujarajn studotagojn de NGGE, ekde 1993 redaktis la bultenon *NGGE Sciigas*. De 1995 li estis kasisto de la nova asocio *Esperanto Nederland*, membro de la *Komisiono pri statuto* de ILEI.

Antônio Martins Filho, d-ro, forpasis la 21-an de decembro 2002. Fondinto kaj rektoro de Federacia Universitato de Stato Cearao (Brazilo), la plej granda amiko de Esperanto en la lando. La Kurson de Esperanto ĉe la universitato li subtenis per dono de propra domo, mebloj kaj aliaj rimedoj.

Titia van der Meulen-Bulthuis (1910 - 2003), dumviva membro, longjara delegito en Delft (Nederlando), mortis la 20-an de januaro.



Mary E. Meyers (1912-2002), dumviva membro, forpasis novembre en Hebron (Usono).

Phyllis Strapps (1905-2002), delegito kaj fakdelegito de UEA, dumviva membro de KELI / Fellowship of British Christian Esperantists, kunfondinto de Okcidenta Federacio de Esperanto-Asocio de Britio, forpasis pasintjare en Felixstowe.

Gabriel Dan Tabor (1923-2002), universitata profesoro, doktoro. Helpis la korektadon de la *Vortaro Esperanto-Rumana* kaj la revuon *ES-TO*, organizis E-kurson por progresintoj, aktiva en la E-mpvado je diversaj niveloj, mortis antaŭ unu jaro en Rumanio.

Usni Zenoski (pseŭdonimo Arifi; 1948-2003), delegito kaj fakdelegito; kunfondinto, prezidanto kaj poste estrarano de E-societo "La ondoj" en Struga, estrarano de Makedona E-Ligo kaj Jugoslavia E-Ligo. Li tradukis *Aŭtobiografio de Zamenhof* kaj Esperanto-himnon en la albanan. Li laboris je la eldono de *Albana Slosilo*. Distingita de JEL. Mortis februare en Ohrid (Makedonio).

DE PLANO AL EFEKTIVECO



Ok studoj pri la demando kiel planlingvo evoluas al efektiva lingvo. Libra eldono de la n-ro 2000/3-4 de *Interface, Journal of Applied Linguistics*.

Planned Languages: From Concept to Reality. De Smet, Schubert, Tonkin, Blanke, Duc Goninaz, Koutny, Liu Haitao, Corsetti, La Torre, van Oostendorp. Red. Klaus Schubert. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001. 257p. ISBN 806813 18. 24 cm. Diverslingva: angla, Esperanto, franca, germana, nederlanda. € 24,00.

ŜLOSILO AL 1286 GASTLOKOJ

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974. Ĉi-jare ĝi enhavas 1286 adresojn en 80 landoj, sur 210 paĝoj.



La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas mendi ĝin kontraŭ 15 EUR + sendokostoj (kun triona rabato ekde tri ekz.) ĉe la Libro-servo de UEA.

Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA, de la kompilinto aŭ de la landaj organizantoj. Pliaj informoj ĉe la kompilinto: Derk Ederveen, Westenburgstr. 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando, paspaserv@wxs.nl, aŭ ĉe: www.esperanto.net/ps.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj. La rolo de planado en la homa komunikado. Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Humphrey Tonkin, Frank Nuessel, Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519, Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 58,00 eŭroj
Institucia abono: 146,00 eŭroj

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

La periodaĵoj de UEA kaj TEJO bonvenigas ankaŭ vin kiel sian leganton en 2003!

Esperanto

11 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere.
€ 32,00*

Kontakt

6 numeroj jare, kun po 16 paĝoj numere.
€ 19,00*

Monde

4 numeroj jare, kun po 20 paĝoj numere.
€ 10,00*

*La prezoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA. Abonu rekte de UEA, aŭ pere de via landa peranto.